



ESPERANTO

APRIL O 1961

esperanto

APRILLO 1961

54a JARO

REVUO INTERNACIA

N-RO 665 (4)

Fondinto : H. HODLER

Ĉion por la redakcio oni sendu al la Redaktoro :
W. Auld, 35 Deer Park, Sauchie, Alloa, (Clackmannan-
shire), Skotlando.

Ĉion pri administrado de UEA kaj de la revuo Esperanto
(abonado, reklamoj, anoncetoj) sendu al UNIVERSALA
ESPERANTO-ASOCIO, Eendrachtsweg 7, Rotterdam-2,
Nederlando. Telefono : (010) 128313. Girkonto : 378964
TELEGRAMADRESO : ESPERANTO ROTTERDAM.

Ĉiu materialo por difinita numero devas atingi respektive
la redakcion aŭ la Centran Oficejon (vidu supre) antaŭ
la 1-a de la antaŭa monato.

Bankisto de U.E.A. :

R. Mees & Zoonen, Blaak 10, Rotterdam-1.

Traduko kaj represo de artikoloj estas permesataj,
kondiĉe ke oni citu la fonton. Oni sendu tian represadon
al nia redakcio.

Jara abono (1961) : 11,50 gld. (kun membreco kaj jarlibro
15,— gld.). Cefdelegitoj kaj Perantoj en multaj landoj.

Tarifo por reklamoj :

1 paĝo 128,— gld, 1/2 paĝo 64,— gld, 1/4 paĝo 32,— gld,
1/8 paĝo 16,— gld, 1/16 paĝo 8,— gld.

Anoncetoj pri korespondado :

0,15 gld por unu vorto aŭ 1 int. respondkupono por ĉiu
duo da vortoj.

Tekstoj de anoncetoj kaj reklamoj aperas ekster la
respondeco de la Redakcio.

Legantoj en 80 landoj.

Estrarar de U.E.A. :

H. W. Holmes, O.B.E., vic-prezidanto kaj aganta prezi-
danto, 38, Fillebrook Road, London E 11, Britujo.

Prof. D-ro Ivo Lapenna, ĝenerala sekretario, 77, Grasmere
Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo.

Prof. D-ro Hideo Yagi, vic-prezidanto, 76 Kawaramachi,
Okayama, Japanujo.

E. J. Woessink, estrarano pri financoj, Vondellaan 47,
Arnhem, Nederlando.

Norman R. Smith, estrarano pri kulturaj aferoj, 75 South
Ealing Road, South Ealing, London W 5, Britujo.

D-ro W. Herrmann, estrarano pri eŭropa lingvo-kampanjo,
Bürstädterstr. 3, (16) Lampertheim-Hessen, Germanujo.

A. Rajski, estrarano pri landaj kaj fakaj asocioj, Odyńca
3/5, Warszawa, Pollando.

Centro de Esploro kaj Dokumentado

77, Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo,
Telefono : ARNold 90-81.

Serva Centro : ĉe Mag. Bruno Keppeler, Place Longemalle
16, Genève, Svislando (provizora adreso).

LA FRONTPAGA BILDO :

Harrogate : Parlament-strato

Foto : Bertram Unne

Enhavo

Alvoko kuraĝigi ĉiujn lingvojn	62
La nubaj nomadoj	63
Duobla evento en Londono	68
Estimata redaktoro	68
Internacia geografia semajno	70
Sonĝo	70
Amo sur plaĝo	70
Rondo "Graĵoj en vento" por estontaj geinstruistoj	72
Adiaŭa kanto	74
Planoj por Tokio	75

Rubrikoj

La lingva ĥaoso	69
Nia forumo	69
CED	71
Novaj libroj	73
La Internaciaj Konkursoj	75
La Juna Vivo	76
Tra la mondo	76
46a U.K.	77
Esperantista Vivo & Nekrologo	78
Oficiala Informilo	78
Radio	79

Manuskriptoj por "Esperanto" estu liveritaj al la
redakcio en du ekzempleroj. Ili devas esti klare
tajpitaj en perfekta Esperanto. Oni skribu sur nur
unu flanko de la papero (prefere en normformato
A4), kun interlinia spaco kaj kun tre larĝa margeno
maldekstre por redakciaj instrukcioj al la presisto.
Supersignitaj literoj devas havi la ĝustajn super-
signojn, se necese permane aldonitajn. Neuzotajn
manuskriptojn oni resendas nur kontraŭ afranko
aŭ respondkupono.

OFICIALA ORGANO DE UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

(EN KONSULTAJ RILATOJ KUN U.N.E.S.C.O.)

LA PRINTEMPA KUNSIDO DE LA ESTRARO

La kutima printempa kunsido de la Estraro okazis en la Centra Oficejo de U.E.A. en Rotterdam de la 24-a ĝis inkluzive la 26-a de Marto. La kunsidojn prezidis la Vic-Prezidanto kaj Aganta Prezidanto de la Asocio S-ro H. W. Holmes O.B.E., kaj ĉeestis la Ĝenerala Sekretario Prof. I. Lapenna, la estraranoj D-ro W. Herrmann, Ing. A. Rajski, N. R. Smith kaj E. J. Woessink. Krome, en la laboro partoprenis la Direktorino de la C. O., F-ino M. H. Vermaas, la Redaktoro de la revuo S-ro W. Auld kaj la K.K.S. S-ro G. C. Fighiera.

Tuj en la komenco la Prezidanto direktis siajn pensojn al la forpasinta Prof. D-ro G. Canuto kaj la ĉeestantoj per unuminuta silento esprimis sian omaĝon kaj respekton al lia memoro.

Unu el la gravaj demandoj estis la kongresa urbo 1962. Alvenis nur du formalaj invitoj: Aarhus kaj Kopenhago. Post tre atenta konsidero de ambaŭ invitoj la Estraro fine decidis elekti KOPENHAGON kiel kongresurbon por 1962. La kongreso okazos tie de la 4-a ĝis la 11-a de Aŭgusto. Tre verŝajne Aarhus organizos antaŭkongreson aŭ postkongreson, tiel ke la kongresanoj havos la okazon viziti ankaŭ tiun urbon de Danlando. Jam pli frue estis farita principa decido, ke la kongreso en 1965 okazu en Tokio. Nun venis formala invito, konforma al la Kongresa Regularo kaj apogita de la Urbestaro de la japana ĉefurbo, kaj la Estraro sekve faris definitivon, ke la U.K. en 1965 okazu en Tokio. Alvenis invitoj de Sofio por 1963 kaj de Parizo por 1964. Por tiuj du invitoj ne estas farita decido, ĉar mankis pluraj informoj, sed la Estraro kun simpatio rilatas al ambaŭ invitoj.

La preparlaboroj por la kongreso en Harrogate normale progresas kaj ankaŭ la ĝisnuna nombro da aliĝintoj respondas pli-malpli al la atendoj. Kiel konate al la kongreso estas ligita la Unua Internacia Arta Festivalo kun la branĉoj Belartaj kaj Oratora Konkursoj, Teatraĵoj, Muziko, Deklamado, Filmoj, Fotografado, Lumbildoj, Magnetofonaj Bendoj, Afiŝoj. Ankaŭ la prelegoj de la I.S.U., rilatos al arto. Estis en la plano okazigi ekspozicion de plastikaj kaj figuraj artoj, sed montriĝis ke tia ekspozicio kaŭzas tro grandajn malfacilaĵojn, precipe pro diversaj obstakloj en ligo kun la dogano, asekuro, transporto k.s. Sekve la Estraro decidis rezigni pri la organizo de tiu branĉo. Anstataŭe okazos ekspozicio de la Esperanta Libro kaj konkurso pri propaganda afiŝo. Estas aprobita la definitiva programo de la kongreso kaj de la Arta Festivalo, kiu estas promesoplena.

Multan tempon okupis la financaj demandoj. La jaro 1960 finiĝis kun konsiderinda deficito. Ĝi estis antaŭvidita kaj tial la Komitato en Bruselo decidis alitigi la kotizojn por 1961. Tiu necesa decido estis akceptita de la membraro kun komprenemo. Montriĝas, ke, malgraŭ la plialtigo, la membraro restas aliĝas. Tio donas esperojn, ke la financa jaro 1961 finiĝos sen deficito. Estas ellaborita la buĝetpropono

por 1962, en kiu la enspezoj kaj elspezoj estas ekvilibritaj. En ligo kun tio la Estraro pritraktis la demandon kiamaniere ankoraŭ altigi la nombron de individuaj membroj. La Estraro konkludis, ke eble ne ĉiuj esperantistoj plene konscias pri la graveco de subteno al la monda organizaĵo. Tial ĝi faris kelkajn decidojn koncerne la metodojn por diskonigi la laboron de la Asocio kaj instigi al ankoraŭ pli grandskala aliĝo. En tiu klopodo ĉiu landa asocio, loka grupo kaj individua membro povas doni grandan helpon kaj la Estraro insiste apelacias al ĉiuj, inkluzive la Esperanto-gazetaron, forte kuraĝigi la esperantistojn aliĝi al U.E.A. kiel individuaj membroj, precipe membroj-abonantoj. La Estraro konstatis kun granda plezuro, ke multaj alte kvalifikitaj personoj en 17 landoj proponis U.E.A. kiel kandidaton por la Nobel Pacpremio 1961. Senkonsidere al la fina decido, tiu fakto per si mem montras la respekton, kiun hodiaŭ ĝuas la Asocio en la ekstera mondo kaj certe tiu plia signo de la daŭre altiĝanta reputacio de U.E.A. kontribuos al ĝia plua interna fortikiĝo per aliĝo de novaj membroj.

En la diskuto pri la Eldona Fakoj novaj eldonaĵoj estis konsiderataj. En la aŭtuno aperos la sekvanta numero de Belarto, kiu pro gravaj malhelpoj ne povis esti publikigita ĝis nun. La ĵus aperinta dua eldono de la bonega lernolibro "Privilegia Vojo" de Vilho Setälä kun instrukcioj en diversaj naciaj lingvoj estas utiligebla ĉie tra la mondo, sed tute speciale en lingvoregionoj, kiuj ankoraŭ ne posedas lernolibron de Esperanto. Sendube tiu lernolibro helpas al la disvastiĝo de la lingvo ankaŭ en Azio kaj Afriko, kie kelkaj kunlaborantoj de A.P.O. faras admirindan laboron. En la Lerneja Kampanjo, kiu donas ĝis nun kontentigajn rezultojn, ofte sentiĝis manko de taŭga lernolibro. Ankaŭ el tiu vidpunkto la eldono de Privilegia Vojo estos salutinda.

El la aliaj decidoj menciindaj estas tiuj pri nova eldono de seslingva flugfolio, kun aktualigita enhavo, ĉi-foje en la lingvoj angla, franca, germana, hispana, japana kaj rusa; pri eldono de propagandaj afiŝoj; okazigo de kunvenoj de kunlaborantoj de la Informaj Fakoj kaj de kunlaborantoj en la Lerneja Kampanjo dum la kongreso en Harrogate; pri la ampleksigo de la laboro de C.E.D.; pri la nova klasigo de la biblioteko de U.E.A., kiu parte nun troviĝas en aparta ejo de la C.O.; pri neceso de nova Kongresa Regularo (prezentota al la Komitato en Harrogate); pri la fortikigo de diversaj fondaĵoj, precipe en la nuna momento, de la Fondaĵo-Zamenhof (ankaŭ kun negativa saldo) kaj fidela al la Asocio. Krome, novaj membroj regule Fondaĵo-Prof. G. Canuto, kiu ebligas pagon de M.A.-kotizoj por esperantistoj el landoj kun valutaj malfacilaĵoj. Fine, la Estraro diskutis la Raporton pri la agado de la Asocio en 1960-61 kaj aprobis la definitivon tekston, kiu estos prezentita al la Komitato.

I. L.

ALVOKO KURAĜIGI ĈIUJN LINGVOJN

**Unuecon oni plej bone
atingas per diverseco,
diras Panikkar**

(Laŭ "The Statesman", New Delhi,
Hindujo, la 22an de novembro, 1960)

La unuecon de Hindujo oni plej bone atingus per la diverseco de ĝiaj lingvoj, kaj tiun diversecon oni devus kuraĝigi, diris s-ro K.M. Panikkar en New Delhi, lundon. Li paroladis en la Diwan Chand Informcentro pri "Lingvaj problemoj kaj la unueco de Hindujo".

Laŭ la Konstitucio, Hindujo havas 13 regionajn lingvojn, kaj oni devus kuraĝigi ĉiujn, diris S-ro Panikkar. Li kontraŭstaris la tendencon troigi la danĝeron de separatismo en la kreskado de tiuj lingvoj. La homoj de Hindujo, li diris, ne evoluigos senton de integrita nacieco, ĝis al ili estos permesita maksimuma ebleco por la evoluigo de ilia denaska genieco, kiu povos flori nur en ilia propra lingvo.

Li atentigis, ke malgraŭ la plej grandaj klopodoj disvastigi la anglan lingvon dum la pasintaj 100 jaroj, nur sep milionoj da personoj konas ĝin hodiaŭ, kaj la lando estas produktinta malmultajn verkistojn de internacia nivelo en la angla. Eĉ la plej bonaj hindaj verkistoj en la angla lingvo estas nur "satelitoj"; aliajn pensojn, ideojn kaj stilon forte influis la fono de la angla lingvo.

S-ro Panikkar diris, ke la utileco de la hindia kiel la administra lingvo estas nedisputebla. Ĝi estas la lingvo de la plej granda grupo, kaj estas facile komprenata en aliaj regionoj. Sed estas elstare grave, kuraĝigi la regionajn lingvojn.

La ekonomiaj, sociaj, politikaj kaj kulturaj fortoj, kiuj unuigis la landon kiel unu staton, estas tro fortaj, ke ilin skuu lingvaj diferencoj, li aldonis. Li atentigis, ke en Eŭropo grandaj landoj kiel Francujo, Germanujo kaj Italujo, kun diversaj nacilingvoj, klopodas atingi politikan, ekonomian kaj kulturan integriĝon, kaj iliaj diversaj lingvoj ne formas baron al tiu procedo.

SINJORO PANIKKAR PRAVAS!

En Hindujo ĉiu edukita persono scias, ke la lingva problemoj estas serioze diskutata nuntempe.

La temo estas grava kaj delikata. Efektive oni ankoraŭ ne sukcesis, ke pro dekreto 400 milionoj da homoj parolu la saman lingvon.

Provizore la angla lingvo restas la oficiala apud la hindia, enkondukata kiel ŝtata lingvo.

Sed, kiel rimarkigis Sinjoro Panikkar, *) dum la publika kunveno pri la "Lingvistikaj problemoj kaj la Unueco de Hindujo", malgraŭ centjaraj klopodoj la angla lingvo estas parolata de nur 7 milionoj da hindoj.

Tio estas ridinda nombro kompare el la 400 milionoj da homoj en Hindujo, kaj signifas, ke nur tiuj edukitaj homoj havas la privilegion povi kontakti kun la angle parolantaj popoloj.

Krom tiu informo, Sinjoro Panikkar atentigas pri tio, ke la kelkaj verkistoj, kiuj uzas la anglan lingvon, estas forte influataj de la anglaj pensoj, ideoj kaj stilo. Li aldonis, ke tiel ili estas nur satelitoj.

Do ekzistas 7 milionoj da hindoj, kiuj pli-malpli apartenas al tiuj satelitoj de la angla lingvo kaj tial pensas plej parte laŭ angla menso.

Kaj kio pri la aliaj 393 milionoj? Ĉu ankaŭ ili ne ŝatus aŭdi pri diversaj aferoj en la cetera mondo? Ĉu ili ne rajtas koni ion alian ol sian propran medion? Ĉu ili ne kapablas lerni, se oni instruas ilin? Kaj, tiam, ĉu ili ne povus lerni iun alian lingvon ol la sian?

Ili, ja, grandparte uzas apud sia gepatra lingvo la hindian lingvon. Sed la angla lingvo ne estas rekomendinda por ili pro kelkaj kaŭzoj, inter kiuj estas la fakto, ke ili ne bezonas ĝin, ĉar la hindia lingvo sufiĉas al ili por la internaj rilatoj.

Por kontakti la ceteran mondon, la angla lingvo ne taŭgas, ĉar ĝi ne estas parolata en la tuta mondo, kvankam oni ofte tion aŭdas. Kaj ĝi neniam estos vere uzata kiel internacia, ĉar tion donus al ĝi prerogativojn, kion ne deziras la uzantoj de aliaj "grandaj" lingvoj. Tion oni jam nun povas konstati en la gravaj internaciaj konferencoj.

Do, por la ordinara popolo, kiu deziras kleriĝi dank'al rilatoj kun la homoj en la tuta mondo, ekzistas nur unu sola lingvo: la Internacia Lingvo "Esperanto", kiu estas la sola neŭtrala rimedo por kontakti kiun ajn en kiu ajn lando.

Granda avantaĝo de Esperanto estas, ke ĝi estas simpla kaj facile lernebla en multe malpli da tempo ol oni kapablas lerni nacian lingvon. Plie, ĝi permesas al la homoj konservi sian propran pensmanieron, ne povante tiel iĝi satelitoj de alia lingvo.

Tiamaniere ili certe restus puraj hindoj, kaj, pli baldaŭ ol per alia rimedo, ili verŝajne atingus tiun unuecon deziratan en Hindujo.

M. Haudebine

*) estinta Ambasadoro en Parizo

LA NUBAJ NOMADOJ

de
Albert Samyn



VOĈOJ:

APOLO, dio, protektanto de belarto

MNEMOSINA, titanidino, patrino de la muzoj,
diino de la memoro

EŬTERPA, muzo, diino de muziko kaj lirika
poezio

LA POETO

1-A GRACIO }
2-A GRACIO } elĉieliĝintaj amorantinoj
3-A GRACIO }

TEMPO DE LA AGADO: en somera vespero,
nuntempe

LOKO DE LA AGADO: en nubo }
en drinkejo } ie en Eŭropo

Uverturo klasika, kun hezitema, melankolia flut-ludado. Dum ĝi forsonas, oni aŭdas monotonan boriladon, interrompitan de fortaj martelbatoj.

APOLO (per malkontenta voĉo): Hej, hej, Mnemosina, ĉesigu vian bruadon! Ĝi krevigas la timpanojn. Ĉe Jupitero, ĉu vi volas, ke mi ankaŭ surdu ja? Ĉu ankoraŭ ne sufiĉas la tuta alia mizero? Mi trankvile ripozu post la vespermanĝo, vi scias; se ne, mi ree ne povos fermi la okulojn dum longa nokto pro malfacila... (li ruktas) digestado. Pardonu. Hundaĉa vivo! Sed, ĉe Jupitero, kion vi faras tie, mi demandas?

MNEMOSINA: Ĉit, ĉit, Apolo! Ankaŭ min, vi sciu, tedegas tiu hundaĉa vivo, pro kiu vi plendadas. — — — Ho, kiom ofte min trapikas rememoro pri longe forpasintaj tagoj sur Helikono! Ĉarmega mi ŝvebis tie inter la plene disvolviĝantaj ĉarmoj de miaj filinoj, la muzoj. Brilis niaj blankmarmoraj korpoj; inspiremajn idealojn elradiis niaj animoj, adoritaj de laŭtaj poetaj laŭdoj! — Kaj nun, kio ni fariĝis, mi kaj miaj filinoj? Tagon post tago ni sidadas en mallumo, griziĝante, paliĝante, baldaŭ tute anemiaj estaĵoj, nu! — Kial ni maljuniĝas, Apolo? Ĉu vi iam supozis, ke grekaj dioj povas maljuniĝi? Kaj tamen ĝi okazis. Via raŭka voĉo incitegas, via sulkiĝinta frunto turmentas, via pufiganta korpo naŭzas min...

APOLO: Silentu, mi ordonas, silentu! Ekbolas mia sango pro viaj senhontaj insultoj.

MNEMOSINA: Ne, Apolo, mi ne silentos ĉi-vespere. Ni vere kadukiĝis. Kiom da jaroj ni jam vagadas en via damnita malhela nubo, senespere ĉiam pli norden, ĝis iun tagon, glaciiginte en malproksima arkto, ni definitive malaperos same kiel la vulgaraj idoloj barbaraj.

APOLO: Vi virinaĉe emfazas! Ni konsideru la faktojn nudaj. Nudaj, ĉu vi aŭdas?

MNEMOSINA: Jam tro mi konsideris la nudan fakton, kiu VI fariĝis, Apolo. Post ĉiu vorto vi pli kaj pli abstraktiĝas antaŭ miaj okuloj. Ne, por mi, ankoraŭ plensanga diino, ne plu eblas la ennuba, nomada vivo en kiu vi ekzilis min kun miaj filinoj, post via antagonisma konflikto kun la homoj. — Aĥ, kial ni ĉiuj tiel mizerulas? — Mi respondos,

se vi ne volas. Ĉar ni perdis la kontakton kun la surteraj homoj, Apolo. Nur tial.

APOLO: Vi deliras, klaĉulino. Ne la dioj kulpas pri la disiĝo! La friponiĝintaj homoj mem forĉasis nin de l'Helikono kaj tute konscie rompis la interrilatojn, dezirante senleĝe kaj senĝene vivi laŭ siaj degenerintaj impulsoj. Apenaŭ mi povis, dank'al mia neatingebla nuboj, savi vian familion el iliaj makulitaj manoj. Ĉu vi jam forgesis? Ĉu ankaŭ via famega memoro konfuziĝis pro modernismaj teorioj, Mnemosina?

MNEMOSINA: Mi ne disputos kun vi pri tiu punkto, Apolo. Vi estas ĉagrenita pro perdita gloro. Sed pravu la dioj kaj kulpu la homoj! Tio estas la bona, laŭtradicia regulo...., kvankam al mi ne plu interesas kiu pravas, nek kiu kulpas en tiaj aferoj. Nur unu sopiro ĉion superas: rekontakti la homojn, iel ajn, ĉar inter ĉielo kaj tero troviĝas mia vivosfero. Tial mi nun boras kaj martelas, Apolo. — Ho, mi konscias, mi ne estas sufiĉe forta por fari truon tiel grandan en vian nubkarceron, ke ni povas fuĝi tra ĝi al tero. Sed malgrandan luketon mi tamen faros, por ke mi almenaŭ povu ree vidi la mondon kaj okule ĝin kontakti. — Vi ankoraŭ iomete toleru la bruon, mi tuj estos preta. (*Rekomenciĝas la borilado kaj batado, pli vigle.*)

APOLO (*per ĉiam pli plorema kaj kolera voĉo*): Stultulino, ĉesigu! Ne difektu nian lastan havaĵon kaj ne nomu ĝin karceron! Vi nur pliprofundigos vian malfeliĉon, vidante la senlimajn frenezaĵojn de la nuntempa, barbara vivo. Ni restu trankvile en la nuboj kaj cerbero gardu la homojn sur la tero! Vi nur malkvietigos ilin, kiam ili sentos vian penetreman rigardon super sia agado. Vi vekos ilian konsciencon kaj sub la pezo de siaj kulpoj ili tute vandaliĝos. Revenos la ĥaoso! Dio de l'dioj, helpu min, klarigu ŝian delirantan cerbon! — — — Ho-o-o-o! Ribelulino, se mi ne devus atenti mian digestadon, mi eltamburadus mian koleron sur vian kurbiĝantan dorson!.... Ververe parolis la poeto:

ĉu homa, ĉu dia, virino
eterne nomiĝos obstino!

(*Ĉesas la bruado.*)

MNEMOSINA (*ravite*): Jen, preta! Ho, Apolo, mi ree ekvidas la teron, kuŝantan sub blua somernokto. Post longaj jaroj, post duboj kaj timoj, per unu sola ribelago, mi efektivigis plej intiman kor-sopiron. Trans montoj kaj valoj, tra hellumaj urboj kaj dormetantaj vilaĝoj, mia radianta rigardo ree vagadas. De nun, nek homo, nek dio disigos min de l'tero. Hej, milda zefiro jam petolas en la trueton! Flirtas miaj haroj kiel ĝojaj flagrubandoj. Mi ree uniĝas. Ekŝvelas diina brusto pro pure humana feliĉo! Venu, Apolo, kaj partoprenu mian ĝojon. Venu, mi petas, karesu min, kisu min.

APOLO: Ho ne! Dankon. Mi preferas mian brakseĝon post la vespermanĝo. Ĝi estas pli sekura.

MNEMOSINA (*revema*): Ho, kiel mi povis tiel

longe vivi, disigita for de tiuj teraj beloj? Mmmm, la unuaj parfumoj ravas min, ebrietigas min....

APOLO (*moke*): Vi baldaŭ elebriiĝos de pli naturaj terodoroj! Ili jam incitas mian flarsenton. (*Li brue ternas*).

MNEMOSINA: Cinikulo!

APOLO: Raciisto, karulino, nur raciisto!

MNEMOSINA: Sed iu devas partopreni mian ĝojon! Tro vasta ĝi estas por mi sola. Eŭterpa, Eŭterpa!

EŬTERPA (*de malproksime*): Panjo?

MNEMOSINA: Venu tuj! Mi ĵus rekontaktis la mondon! Trablovas aero freŝa nian mucidan nubovivon.

APOLO (*moke*): Sed metu diklanan ŝalon sur la ŝultrojn, ke vi ne malvarmumu! Via sano estas ja tiel delikata!

(*Viglaĵ, malpezaj paŝoj.*)

EŬTERPA (*ĝojkriante*): Mirinda, mirinda! Kvazaŭ disvolviĝanta miraĵo etendiĝas la mondo antaŭ miaj okuloj. Ho, panjo, ĉu vere vi kuraĝis ebligi tion, forspitante ĉiujn severajn diregulojn? Tio meritas kison. (*Ŝi brue kisas ŝin.*)

APOLO: Jam bone, jam bone, moderigu la filinon ardon! Via patrino ja obstine transpaŝis miajn leĝojn, sed mi scivolas pri la sekvo de la historio.... (*Kvazaŭ poezieme*;) Vesperigis surtere kaj estas somera vetero. Finiĝis ĉiu homa penado. Ripozas la korpoj. Nun povas supreniĝi la animoj al altaj celoj. Povas supreniĝi la ideoj kaj ŝvebi laŭ muziko de l' senfina stelfirmamento.. jes, kiel en antikvaj tempoj. — — — (*Li rikanas.*) Nu, diru al mi, ĉu ne unu homa animo, ĉu ne almenaŭ ies perdita ideo, petolante antaŭ la trueto de nia nuboj, petegas kontakton kun vi, Mnemosina?

MNEMOSINA (*reveme*): Ĉie super la landoj supreniĝas la ideoj, kiel antaŭe en nia atika patrujo. Ja izolaj ili estas, Apolo, kaj malfortaj pro izoleco, sed tamen multaj. Ne moku! Ĉiuj kune ili formus belegan artfajraĵon je nia honoro. Ho, kiel magneto mia dia memoro nekontraŭstareble altiros la leviĝantajn homajn ideojn. Vi ne malesperigos min!

APOLO (*kolere*): Faru tion la homoj, pedantulino!

EŬTERPA (*ekscitite*): Vidu, panjo, jen! Zigzagadas ideo alten-malalten tra la ĉielo, kvazaŭ ĝi imitus grafikaĵon de knabina kapricemo. Kiel burleska! Tute ebriula ideo! Jen ĝi ree supreniĝas, pli.... kaj pli.... kaj pli.... brave, brave! (*Ŝi manfrapas pro ĝojo.*)Ho, domaĝe, jen ĝi falis jam teren kaj trenas sin kiel malinda raŭpo...

APOLO (*maltrankvile*): Ĉu ankaŭ en interplana trafiko mia malnova Eŭropo eksperimentas amerikane, Mnemosina?

MNEMOSINA: Ankoraŭ ne, Apolo! Ĝi estis nur eta poeta ideo, kiu vane klopodis kurataki la ĉielan remparon. — — — Ho, bone mi ekvidas lin, la junan poeteton, vagantan tra la dezertaj, duon-

mallumaj stratoj de la ĉefurbo en kiu li loĝas interuloj, kiuj ne komprenas liajn vortojn nek vivas laŭ lia ritmo. Ili pritraktas lin kiel spiritan ebriulon kaj ja reale ebria li ankaŭ estas ĉi-vespere. Sed nur por forgesi sian nostalgion al poetaj landoj de siaj revoj; por forgesi la senĉesan torturon de ĉiaspecaj laboremuloj kaj praktikuloj, sub kiuj li suferas. Tial li restas glora kaj bela, unika antaŭ miaj okuloj, malgraŭ sia ebrieco kaj malgraŭ sia ringbarbeto kaj netonditaj, sovaĝaj haroj. — Mi ne plu lasos lin. Kun li mi eksperimentos la unuan rekontakton. — (*Inviteme*): Venu, poeto, venu, diino rememorigas vin! — Helpu min, Eŭterpa, ludante viajn plej ensorĉigantajn ariojn. Ĉi tiun vesperon mem, ni kaptu lin. (*Eŭterpa flutludas allogan kanteton.*)

APOLO (*dume*): Ĉe Jupitero! Voluptulinoj! Kia vespero, ho, kia vespero! Ili komplete malordigos mian digestadon.

MNEMOSINA (*dume*): Vidu, li ekhaltas. Strangan muzikon li ekaŭdas en la ĉielo. Li rigardas la lunon, la stelojn, la nubojn..... — Venu, poeto, venu, diino rememorigas vin! — enpensigas, manfrotas sur la frunton, kapskuas.... — Ho, venu, poeto, venu al mi! Ne foriru jam, ĉu vi ne aŭdas mian voĉon? Ne eblas ke ĝi tiel malfortiĝis! Aŭ ĉu vi ne plu komprenas ĝin? Ĉu eĉ poeto ne plu komprenas ĝin? — — — Ne, li ne komprenis la ĉielan muzikon. Li iras plue. (*Malĝoje* :) Ĉesigu, Eŭterpa, vian ludon. Nun li troviĝas sur brua, helluma ĉefa-venuo, kie li certe ne plu aŭdus nin.

(*La flutludo ĉesas.*) Mi perdis la unuan grandan esperon. Sed mi daŭrigos, mi ne ŝtopos la trueton, kiun mi faris en nian nubon. (*Abrupte kaj terurite.*) Ne, ne faru tion, mi petegas, ne eniru, poeto, ne eniru. Memoru vian devenon, ne hontigu diinon, kiu tiom esperis je vi!

APOLO (*Scivole*): Kio okazas?

MNEMOSINA (*singulte*): Jam okazis. Povra poeto! Pli forta ol mia voko altiris lin iu suspekta drinkejo. (*Mallaŭte ŝi ploretas.*) "La falintaj Gracioj", ĝi nomiĝas. — — — Venu, Eŭterpa, apud mi, kaj priploru kun mi la perditan okazon.

APOLO (*brue ekridegante*): Forprenu Jupitero de mi eĉ la rememoron de ĉiuj virinoj, kiujn mi iam havis, se mi ne antaŭsentis ĝin, jes, se mi ne antaŭsentis, ke tiel finiĝos la unua rekontakto! (*Lia rido transpasas en monotonan ĝazmuzikon. Forsonas la muziko en helajn, virinajn trilridojn.*)

1-A GRACIO: Ne, vane, nia poeteto obstine rifuzas gajiĝi ĉi-vespere.

2-A GRACIO: Ĉu eble niaj ĉarmoj plene eluziĝis, amikinoj?

3-A GRACIO: Jen ankoraŭ glason da vino, ĉarmulo. Plifortigu vin kaj kantu por ni viajn lastajn kisrondelojn!

1-A GRACIO: Kial vi premfermas la buŝon antaŭ niaj petolemaj lipoj?



2-A GRACIO: Trinku la ĉampanon, kiun la gracioj proponas al vi.

3-A GRACIO: Ne forpuŝu min de viaj genuoj, sed elĉerpu la poezion el la poemo de miaj okuloj.

POETO (*ebrie kaj lace*): Lasu min, kruelaj torturantinoj, lasu min trankvila! Kaj aŭskultu. — — Ĉi tiun vesperon mi ne ĝuamos kun vi kiel aliajn vesperojn. Ne, ne protestu, mi petas. Dia mano skribis misterajn hieroglifojn sur la ĉielo kaj mi aŭdis obtuzan alvokon de anĝela voĉo ŝvebanta tra la nuboj.... Ĝia eĥo kvazaŭ ekzumzumigis instigantan abelon en mia cerbo... Estis al mi kvazaŭ la nuboj fendiĝis kaj diaj radioj klopodis revivigi la dormegantan teran animon. — — — (*Terurite* :) Sed diru, dum ĉio ĉi tio okazas ekstere, por kio mi do eniris ĉi tiun malbenitan domon de tri elĉieliĝintaj Gracioj..., kial do mi restas enfermita ĉi tie?

1-A GRACIO: Jes, kial, mi demandas min! Ja ne por rezonaĉi, hej!

POETO (*reveme*): Mi ne scias. Mi estas tiel laca.... Eble mi nur venis ĉi tien pro kutimo. Jes, pro diable malagrabla kutimo! Aĥ, tedas min via ĉetera korpoplezuro....

2-A GRACIO: Perfidulo!

POETO (*ravite*): Bakanalas miaj cerboĉeloj sub

memoro de dolĉa flutludado.... Mi ekaŭdis ĝin antaŭ ol eniri la ĉefavenuon. Eble ĝi venis de iu hontema nimfeto, kaŝita en la arbfoliaro.... kiel en antikvaj tempoj.

3-A GRACIO : Li komplete freneziĝas. Ĉu li ne danĝeriĝos al ni?

POETO (*dube*) : Aŭ ĉu eble ĝi venis de la Muzo mem? — — — (*Kvazaŭ rivelado trafas lin :*) Jes, ĉu ĝi ne estis Muza voĉo, alvokanta la poeton al si? — Kaj mi, mizerulo, mi eniris ĉi tiun bordelon, ne kompreninte ŝian kanton! Mi, grandfrazo poeto, ne komprenis ĝin! Ho, diablaj virinaĉoj, kiel vi makulis mian animan purecon! Lasu min, mi ordonas, for de mi, ke mi tuj eliru!

1-A GRACIO : Atentu! Li ne povas teni sin sur la piedoj, li estas tro ebriega, li ŝanceliĝas... Helpu lin, li rompigos la glasojn.... jen li falas.... (*Kriegante :*) Ho!

(*Stumblado. Falantaj korpo kaj tableto. Frakasitaj glasoj kaj boteloj.*)

POETO (*senkomprene*) : Hej, kio okazas? Ĉu la mondo renversiĝis? — Mi ne plu komprenas. Mi sentas min tiel laca, peza, dormema... Kio tiel ebriigis mian spiriton? Tamen mi ne drinkis pli ol aliajn vesperojn! Kion mi intencis fari? — — — Ho jes, mi rememoras, la Muzo! Mi devas eliri, ek sur la straton, eble ŝi ankoraŭ alvokas min, la povrolino, malesperante pro sia vana alvoko. — (*Krias :*) Atendu, Muzo, nur iomete paciencu, via poeto venos, eĉ se li devus rampi ĝis la sojlo. (*Stumblado.*) Ne, ne sukcesas.... Mi estas tro laca, tro ĝenata de la.... peza korpo. Unue ĝi volas iom ripozi... dormi. Sed poste, la spirito leviĝos..... sin levos al vi, mia alsopirata Muzo. Mi ĵuras ĝin. Helpu min Jupitero, por ke ĉi-foje mi plenumu mian promeson! — Sed nun, je la nomo de la plej nerezisteblaj diinoj, mi unue ripozu! — — — Atendu, Muzo, iel iam ajn mi alvenos.... — (*Duondorme :*) Tro sopiregas la moderna.... poeta koro..... al la ĉiela patrolando, al la diina hejmo.... kaj vi, Jupitero, regalu.... vian revenintan filon..... buĉante..... ĉi tiujn tri grasajn..... bovidinojn..... (*Li oscedas,, poste ronkante ekdormas.*)

1-A GRACIO : La brutaco! Ĉu vi iam kredus, ke li riskus tiel insulti nin!

2-A GRACIO : Li tute alkoholiĝis! Jam plene ebria li estis, kiam li transpaŝis nian sojlon. — Rigardu, amikino, kiom da mono li ankoraŭ posedas.

3-A GRACIO : Plena de paperetoj lia monujo estas.... sed mono, eĉ ne sufiĉa por aĉeti paron da malkaraj nilonŝtrumpoj por ni!

2-A GRACIO : Ho, la klaĉpoeto! Kaj pro liaj stultaĵoj, mi eble perdis favoran vesperon aliloke.....

1-A GRACIO : Ne plendu, franjo! Tio ne helpas al vi. Sed ni venĝu nin! Aŭskultu, brilega ideo kirliĝas tra mia kapo. — (*Mokeme :*) Li ja konfesis al ni, ke li sopiras, kiel dia filo, al dia hejmo. Nu,

li tien reiru. Sed ĉu ne tro malpuriĝis la benito pro kontakto kun ni, malpuraj kreitaĵoj? — Inda kaj solena li alvenu tie. Ni fortendu lian mondu-man ringbarbeton kaj liajn satirusharojn. En kofro en la subtegmentejo mi ankoraŭ havas malnovan perukon kaj artefaritan sanktulan barbon. Mi donacas ilin al li. Ni surgluos ilin sur lian poetaĉan kapon kaj tiel, hop, ni ĵetu lin en la strateton post la domo, kie li plue priaŭskultadu la muzan alvokon.

2-A GRACIO : Bonega ideo!

3-A GRACIO : Brilega venĝo!

1-A GRACIO : Ek, amikinoj! Unu el vi serĉu la perukon kaj la barbon. Dume ni jam tondos lin. Jen la elektra tondilo. Metu la kapon sur miajn genuojn, perfida poeteto mia, dolĉe, dolĉe... Pli frue ol vi iam esperis, via diiĝo plenumiĝos.... (*Zumzumus tondilo.*) Plilaŭtigu iom la muzikon, amikino, por ke mi plej vigle fasonu tiun malcedeman hararon.

(*Gaja ĝazmuziko. Dume oni aŭdas de tempo al tempo rapidajn paŝojn, fermiĝintan pordon, ridojn kaj ĝojkriojn kiel : "Bone, bone!" "Jen ankoraŭ tufeto!" "Tondu, tondu!" "Brave!" "Donu la perukon!" "Ho, kian dian hararon li nun havas!" "Mmmm, belega, rava!" "Kaj nun la barbon!" "Algluu ĝin firme kaj forte!" "Ĝi sidas malrekte!" "Lasu, estas ankoraŭ pli poetinde — Poste, muziko surfone.*)

1-A GRACIO : Jen, preta! Ĉu li ne die aspektas? — Kaj nun, amikinoj, ni prenu lian veŝton kiel garantiaĵon, por ke li revenu ĉi tie kaj pagu al ni la perditan tempon kaj la frakasitajn glasojn.

2-A GRACIO : Kaj jen mi ankoraŭ strios liajn vangojn per mia lipruĝilo, por ke ruĝiĝante kiel pomo li eniru la ĉielon.

3-A GRACIO : Rapidu, rapidu, amikinoj! Mi jam malfermis la pordon.

1-A GRACIO : Mi tenas lin ĉe la ŝultroj....

2-A GRACIO : Mi jam havas liajn piedojn....

1-A GRACIO : Kaj ek, ni foriru. Ho, kiom li pezas:...

2-A GRACIO : Pezas nur la drinkaĵoj, per kiuj li plenigis sian ventron.

(*Stumblado. Paŝoj. Voĉoj de la virinoj : "Antentu lian kapon!" "Ne gravas!" Muziko tute forsvenas.*)

1-A GRACIO : Rigardu, franjo, ĉu vi vidas iun en la strateto?

3-A GRACIO : Eĉ ne hundon!

2-A GRACIO : Bone! Nu, atentu, amikino, ni ĵetos lin. Unu, du, tri kaj hop....

(*Krude falanta korpo. Malicaj trilridoj de la virinoj, forsonantaj.*)

(*Hela kaj magia gongobato traeĥas la nubojn.*)

APOLO : Ĉe Jupitero, kia bruo! Ĉu nova eksplodo surtere? — (*Furioze :*) Diru, ĉu laŭvice vi kaj la homoj malkvietigos min, Mnemosina, por ke

eĉ en mia propra nuboj mi neniel neniam povu ankoraŭ digestadi trankvile?

EŬTERPA (*plorsingulte*): Ho, panjo, panjo, vidu! Tri malicaj graciaj ĵus ĵetis nian poeton en la koton de stratkanaletoj. Jen li kuŝas en la mallumo.... ornamita kiel karnavala senspritulo, panjo.... kun malrekte gluita barbo kaj mulpura, plenpolva peruko.... kun strioj ruĝaj kiel vundoj sur la vizaĝo kaj en ŝirita ĉemizo sur kiu abundas bier- kaj vinmakuloj.... Ho, honto, neforviŝebla honto sur nia laŭrokrono!

APOLO (*gajiĝante*): Ja tute bone vi elektis vian modernan poeton, Eŭterpa! Kia ĉarma, nobla interkonatiĝo, mi ekscias! — KREDU min, ĉu homoj, ĉu bestoj, karinoj, egale, ili restas bestoj! Bedaŭru vian malobeon kaj ŝtopu la trueton.

MNEMOSINA: Silentu, Apolo! — Kaj vi, Eŭterpa, konsoliĝu. Vi estas tro juna, tro malsperta, tro idealisma por kompreni tion. Tamen, ne malesperu! Subiĝu la poeta vaganto plene en la abomenaĵoj de la surtera vivo..., sed iam lia spirito revenos al ni. Ĉiam ekstremigas la poeto siajn agojn kaj de unu ekstremo svingiĝas al alia. Tiel li kunportos nin de plej profunda malĝojo al plej alta beato.... kaj poste returne! Ne limigas ethomaj leĝoj lian vastan animon. Nur forta, superhoma dio povus submeti lin.... Sed jen sidas unu, ĉagrenita kaj malsana sub la polvo de sia enuo, nomadanta tra la nuboj kaj malzorganta eĉ la diajn devojn....

APOLO (*Kolerege*): Dio de l'dioj, mi freneziĝos! Por la lasta fojo mi avertas, Mnemosina, ne plu incitu min; alie, mi ĵetos vin teren kune kun viaj filinoj kaj tie vi kuŝu en la koto apud via poeta ĉarlatano.

EŬTERPA (*mire*): Jen, panjo, vidu! Ĉu nia poeto vekiĝas el sia ebrio?

MNEMOSINA: Ne, nur lia spirito iom moviĝas....

EŬTERPA (*ekscitite*): Tamen.... vidu la ideojn flamerojn. Ili ree ekŝprucas!

MNEMOSINA: Ne iluziu vin per vana espero, Eŭterpa.... Ne venis ankoraŭ la momento.

EŬTERPA: Ili ankoraŭ plimultiĝas.... kaj supreniĝas jam pli alten.... Jen, veraj etaj ideraketoj....

MNEMOSINA: Ne eble! Ĉu miaj okuloj ne trompas min? Ĉu malgraŭ ĉio la miraklo okazos ĉi-vespere? — (*Preĝante* :) Jupitero, Dio de l'dioj, mi preĝas al vi, kie ajn vi vagadas en la ĉielo, helpu mian poeton, por ke li alvenu ĉi tie kaj liberigante nin, liberigos mem.

EŬTERPA: Jen tute grandaj fajraj ideraketoj... Vidu, ili flugas al la nuboj... Ĉu ili atingos ilin? — — — Ne, ne sukcesis... Ili ree terenfalas.

MNEMOSINA (*preĝante*): Dio de l'dioj, pro la memoro de mia amo donacinta al vi naŭ diajn filinojn, helpu lin, ke li atingu nin....

APOLO (*indignite*): Ĉu vi deliras, Mnemosina?

EŬTERPA (*plaŭdante*): Novaj raketoj, panjo, multaj, fortaj.... Ili venas rekte al ni.... (*Kriegante* :) Atentu, ŝirmu vin! Ili kuratakos nian nubon! (*Bombardas la poetaj ideoj la nubon. Bruo kaj frakaso. Dume muziko elvokas triumfan kuratakon. Forsonas bruoj kaj muziko.*)

MNEMOSINA (*ĝoje*): Venu, filinoj, venu ĉiuj. Fendiĝis la nuboj. Refluas la sango tra miaj vejnoj. Venu, filinoj, tuj. Poeto liberigis nin. Vengante la korpan humiliĝon, lia spirito malfermis la ĉielon. Ja veran poeton ni kontaktis.

(*Dolĉa muziko elvokas la ĝojn foriron.*)

APOLO (*dume, kriegante*): Mnemosina, restu, mi ordonas. Kunvoku viajn filinojn kaj diru, ke ili restu? Revenu, mi ordonas.

MNEMOSINA (*dume, de malproksime*): Ne eble, Apolo! Nerezisteble altiras min la tero, ĉar inter ĉielo kaj tero estas mia vivosfero. Venu kun ni, Apolo, aŭ fordrivu en la nigra nuboj de via ĉagreno. Adiaŭ!

(*Muziko forsonas.*)

APOLO (*malrapide kaj malĝoje*): Ho, kia vespero! — — — Hieraŭ mi estis ankoraŭ ĉirkaŭita de patrino kun naŭ filinoj, kaj hodiaŭ vespere, mi sidas jam sola kiel vidva grizulo. Jen la fidindeco de ĉielaj virinoj! Damna poetaĉo! — — — Li ne nur malordigas mian digestadon, sed komplete fuŝas mian nubon! Ĉe Jupitero, kia vivo, mi diras. Rigardu la fendojn, kiujn tiu ĉielpirato faris, ne eble ŝtopi ilin. — — — Trablovas malvarma vento mian antaŭe tiel varmetan nubon, mi atentu, ke mi ne malvarmumu.... (*Li dufoje ternas.*) Jen, jam okazis. — — — Sed kion mi faros? Konstrui alian nubon ne sufiĉas por esti izole kaj vivi trankvile...., mi kruele spertis. Ĉu iri al aliaj planedoj? — Ne, ankaŭ malbona ideo, ili jam estas eksperimenta tereno de konkeremaj sciencistoj.... Mi ne ŝatas renkonti ilin tie.... Ho, milfoje damna poetaĉo, mi ripetas! Por solvi unu virinan problemon, li senpripense estigas cent aliajn! Kaj konfuzas diojn! — — — Kie li estas nun? Jen, li jam balanciĝas hejmen, fierante kiel koko inter miaj dek ĉirkaŭflugetantaj perfidulinoj! — Ho, kia vespero! Sed kion mi faros, jes, diru al mi, kion mi devas fari? — — — (*Ree eksonas dolĉa muziko. Dume li daŭrigas* :) Jen la terura alternativo antaŭ kiu poeta ebrio metis min: aŭ morti izole kaj malvarme en disŝiritaj nuboparceloj, aŭ reiri al tero! — — — Bone, mi reiros. Mi ree provu malsovaĝigi la homan brutaron! — (*Laŭte* :) Sed vi, nubfendanto, ne tro ĝoju pro via venko! Vi ne petolos kun miaj muzoj senĉene kaj kontraŭleĝe, kiel vi jam tro longe kutimis kun viaj.... petolemaj graciaj! Revenos la leĝoj kaj la limoj por vi, revenos ordo kaj disciplino. Malfermite la ĉielon, vi ja mem volis ĝin. — — — Atentu, kun la Muzoj revenas Apolo! (*Muziko finale forta. Gongobato.*)

DUOBLA EVENTO EN LONDONO

Dum tri tagoj antaŭ la 46-a Universala Kongreso en Harrogate, Londono estos centro de du paralelaj Esperantistaj kunvenoj: Oficiala Antaŭkongreso 1961, kaj Seminario "Oriento-Okcidento". Ambaŭ aranĝoj ĝuas aŭspicion de U.E.A.

Tiu ĉi dukapeco fontas ne el ia kaprica konkursemo sed male el materia bezono kiu en lastaj jaroj fariĝis pli kaj pli evidenta. Niaj kongresoj donas nome okazon por vaste diversaj aplikoj de la Internacia Lingvo, tiel diversaj, efektive, ke por unu kongresano jam ne sufiĉas la tempo por digesti la tutan programon, kaj por tiel ampleksa programo jam ne sufiĉas unu sola kongresejo. Cetero, diversaj programeroj postulas malsamajn etosojn, kaj la klopodo, ĉiujn enstrudi en nur unu kadron, eble ne donas ĉiam idealajn rezultojn. En la Brita ĉefurbo tiu problemo solviĝas. La ĉijara Antaŭkongreso kaj Seminario proponas, fizike sendependaj kvankam organize kunligitaj, unuarangan intelektan frandaĵon kaj plenŝtopitan ferian programon. Ĉiu povas tiel dediĉi sian tempon al unu programo aŭ alia, kun reciproka profito ankaŭ al la sukceso kaj kvalito de la aranĝoj. Nur ĉe la Balo koincidus ejoj kaj personaroj.

Fundamenta principo de la Antaŭkongresa programo estas distro kaj libereco, ĉar Londono estas ja tiel multaspekta milionejo, ke distron ĝi proponas ĉiam kaj al ĉiu — "Kiun Londono enuigas, la Vivo enuigas" — kaj sekve necesas iomagrada individua libereco, por kontentigi ĉiujn interesojn. Kiu deziras en du tri horoj rapide konatiĝi kun la plej elstaraj historiaj kaj arkitekturaj vidindaĵoj de Londono, havos ĉiutage tri okazojn por tion fari. Kiu emas en malgranda grupo Esperantista esplori zoologiajn ĝardenojn, aŭ muzeojn, aŭ noktejojn, aŭ ŝipekskursi sur Tamizo, aŭ pasigi vesperon en unu el kvindek teatroj aŭ ĉe la fama Festivala Baledo, butikumi en Bond Street aŭ gapi en galerioj — kia ajn la intereso, por ĉiu troviĝos

kompetanta gvidanto. Por tiuj, kiuj deziras ankaŭ pli vaste ekskursi, jam estas aranĝitaj ĉiutagaj pli longaj ekskursoj: apartaj tuttagaj al la belegaj universitataj urboj Oxford kaj Cambridge, kaj tria al la palacaj hejmoj de anglaj aristokratoj nuntempe, kun siaj gravaj artkolektoj, publike viziteblaj.

La titolo de la Seminario, "Oriento-Okcidento", aludas al la dek-jara Projekto de UNESKO por "Reciproka Kompreno de Orientaj kaj Okcidentaj Kulturaj Valoroj" iniciatita en 1957. Al tiu projekto la Esperantistoj kontribuas jam sur pluraj frontoj, ekz. en Mainz 1958, en Fros-tavallen 1959, en la aperonta libro-serio de U.E.A. ktp. La plano por la nuna jaro estas ankoraŭ pli vasta: esplori tiun problemon ne nur laŭ ĉiuj eblecoj de la havebla Esperantista talento, sed ankaŭ en kontakto kun Britaj kompetentuloj. La kulturaj heredaĵoj de la Brita imperisma epoko en Azio kaj Afriko donas al Londono apartan taŭgecon por tia konferenco. En la Londona Universitato troviĝas aparta Instituto de Orientaj kaj Afrikaj studoj. En Londono mem loĝas centmiloj da Azianoj kaj Afrikanoj. En ĝiaj muzeoj kaj galerioj troviĝas netakseble riĉaj kolektoj de Orientaj kaj Afrikaj artaĵoj. Ĉiujn ĉi avantaĝojn la Seminario ĝislime ekspluatos por fariĝi konkreta kontribuo al la interkontinenta kompreno.

Ankaŭ el organiza vidpunkto la Antaŭkongreso kaj Seminario estas eksterordinare bonŝancaj. Aliĝantojn atendas rezervitaj litoj en komfortaj hoteloj — ĝuste en tiu sama kvartalo, kie situas la Universitato, ĝuste tie, de kie ekveturos ĉiuj ekskursoj, kaj ĝuste je dekminuta pieda distanco de la stacio, el kiu la fervoja karavano pluvojaĝos al Harrogate. Sed unu grava averto estas nepre necesa. Pro la grandega turisma populareco de Londono, je tiuj samaj datoj — 2-4 Aŭgusto — pasintjare troviĝis eĉ ne unu libera hotela lito en tuta Londono. La Antaŭkongresa Komitato feliĉe sukcesis rezervi provizore sufiĉe grandan kvanton da litoj — sed la kvanto estas severe limigita. Tial ne hezitu: aliĝu frue — kaj estu bonvenaj!

Noto: Pliaj informoj estas riceveblaj de:

Victor Sadler, 1 Poet's Road, Highbury, London, N.5.

Estimata redaktoro...

"Komparu la emocian potencon de anglaj vortoj kun tiuj de artefarita lingvo kiel Esperanto. La angla pulsadas je vivo — la vortoj mem estas vivantaj — dum Esperanto, zorge konstruite laŭ formulo de signifoj, estas tiel ekscita kiel malnova araneajo". — El artikolo en "The Scottish Daily Mail", Edinburgo.



Al la redaktoro,
"Scottish Daily Mail",
Edinburgo.

Estimata sinjoro,

Mi volas plej forte protesti kontraŭ la komento de Neil McCallum, ke "la angla pulsadas je vivo... dum Esperanto... estas tiel ekscita kiel malnova araneajo". Tiu eldiro estas absolute malvera. Iu ajn lingvo posedas emocian potencon kaj pulsadas je vivo por tiuj kiuj scias kaj uzas ĝin. La plej emocia angla legaĵo signifas precize nenion al ne-angleparolantoj. Efektive, al multaj angleparolantoj tia legaĵo signifas malmulton,

pro ilia manko de vortprovizo kaj kultura fono. Alineoj (kaj vortoj) en Esperanto estas emociaj por tiuj, kiuj posedas la lingvon. Esperantaj vortoj NE estas "konstruitaj". La angla lingvo konsistas el vortoj prenitaj el multegaj aliaj lingvoj, kiuj adaptiĝis al la fundamenta regularo de la angla. Precize la samo estas vera rilate Esperanton, kiu estas eĉ ne minimume malsupera al la angla en iu ajn punkto.

Neil McCallum invitas nin "kompari", sed mi sugestas, ke li mem ne kapablas tion fari. Evidente li ne legis la verkojn de Kalocsay, Francis, Boulton, Baghy, Waringhien kaj dudeko da aliaj ĉefverkistoj en Esperanto, kiel li ankaŭ ne aŭskultis al tiaj oratoroj kiaj Lapenna.

Kiom da emocia potenco havas por McCallum la finna, kaj kiel li scias? Kiom da emocia potenco posedis la antikva egipta? Ĉiu lingvo estas precize tiel vivanta kaj esprimiva kiel ĝiaj vivantaj posedantoj. Tio inkluzivas Esperanton.

Kaj, se tio interesas Neil McCallum, Esperanto, kiel ĉiu vivanta lingvo, havas ankaŭ siajn sakrajn vortojn (1).

Ĉar mi estas, bedaŭrinde, nepre certa, ke vi ne donos justecon al konsentita minoritato per publikigo de tiu ĉi rebato al mensoga kaj nerespondeca eldiro, mi estos vere danka se vi sciigos miajn komentojn al ĝia eldirinto.

Via,
W. Auld



Malgraŭ — aŭ pro? — la lasta frazo, la redaktoro tamen presigis, sub digna kaj okultrafa titolo, tiujn partojn de la letero, kiuj estas kursive presitaj supre. La skribinto tuj pardonpetis pro sia skeptikemo kaj dankis la redakcion; li ricevis respondon, certigante al li, ke la redaktoro ĉiam volonte presigos liajn leterojn.

Ekzistas diversaj vojoj al unu celo. Ankaŭ la justa kolero kelkfoje efikas!



(1) Estas necese klarigi, ke la originala artikolo de McCallum pritraktis la vivantecon de ĉefe sakraj vortoj — tial utilis tiu ĉi frazo.

Nutraĵo ankoraŭ ne en Kasai

Leopoldstad. — La 7000 kg. da nutraĵo kaj medikamentoj, kiun povis aĉeti la Fondaĵo-Eŭkumena Helpejo en Utrecht per la mono, kiun kolektis kun ekzempla entuziasmo la lernantoj de la Kristana liceo Buitenveldert en Amsterdam, alvenis en Kongo. Sed en la malsatanta provinco Kasai ankoraŭ neniue elĉerpita kompatinduleto ricevis unu solan guton da nederlanda lakto: la tuta kvanto da nutraĵo kaj kinino — valoro 12.000 gld., transportkostoj pagitaj de la Fondaĵo, ĉ. 45.000 gld. — kuŝas kune kun granda provizo de objektoj el la tuta mondo en aviadilejo sur la aerodromo de Leopoldstad.

La Stanley-hotelo transformiĝis al Oficejo. Ĉiuj eblaj sekcioj de la Unuiĝintaj Nacioj laboras tie en aerumataj ĉambroj: militistoj, sed ankaŭ kuracistoj, financaj specialistoj, agrikulturaj fakuloj, informservoj, transport-specialistoj, eĉ militista polico trovis lokon kaj improviziis malliberejon tie.

Ĉiu sekcio disponas pri nombro da interpretistoj: la francoj ne povas paroli kun la indonezianoj, nek la angloj kun la marokanoj, nek la niĝerianoj kun la svedoj, nek la usonanoj kun la sudananoj. La lingvokonfuzo estas neimageble granda kaj ne povas ne havi influon je la rapideco kaj la kvalito de la laboro.

El "Het Rotterdams Parool", Rotterdam, 31-1-1961.

Kulture / / la Filipininsuloj ŝvebas en la aero. Ĝis nun la grandan kulturan dilemon, kiu maltrankviligas aliajn ekskoloniajn azianojn, la demandon pri nacia lingvo, oni tutsimple evitis. La insuloj estas dividitaj inter tri ĉefaj lingvogrupoj (tagaloga, lokana kaj la visaja grupo), kaj subdividitaj je proksimume 70 dialektoj. La tagalogan, la oficialan nacian lingvon, parolas malpli ol 20% de la filipinanoj, kaj iun ajn aktivan klopodon devigi ĝian uzadon kontraŭstarus en la parlamentejo la grandega netagaloga majoritato.

Dume, la angla ĉefas. Kuriozmaniere la uzado de la hispana daŭras. Jurnalonoj oni eldonas en la hispana; ĝi estas deviga objekto por ĉiuj universitataj studentoj; parolas ĝin hejme malgranda elitularo, kaj multaj altklasaj knabinoj estas sendataj por finisian edukon en Hispanujo. Sed la influo de la angla estas multe pli vasta. La tuta edukistemo ekde la tria klaso de la elementaj lernejoj uzas la anglan kiel la instrulingvon. La malrapidigan efikon de la instruado kaj lernado de ĉiuj objektoj pere de fremda, malperfekte komprenata lingvo oni povas imagi. Edukado, kiu ne havas tradicion pri alta nivelo, estas grade malplibonigata.

(Laŭ "New Statesman", Londono, 10.2.1961.)

Ĉu ni vere bezonas literaturon?

Okaze de la sepdekjara naskiĝtago de Julio BAGHY, mi denove legadis lian interesan kaj bonegan verkon: *Sonĝe sub pomarbo*. Kaj dum la legado venis al mi la penso: kiom da ekzempleroj aperis el ĉi tiu bela libro kaj mi legis: "Finpresita 10 jul. 1958. Eldonnombro: 1.100 ekz."

Samtempe, hazarde mi legis en kelkaj esperantaj gazetoj kaj revuoj, ke la libro: *Sonĝe sub pomarbo* ankoraŭ estas aĉetebla. Kaj tiam mi triste konstatis tiun malĝojigan fakton ke unu el la plej valoraj verkoj de la esperanta literaturo, — tiu de J. Baghy — post tri jaroj de la eldono, facile estas aĉetebla, do la 1.100 ekzempleroj dum tri jaroj ne elĉerpiĝis!

Kiel estas tio ebla? Oni diras ke la peticion al UNESKO subskribis ĉ. 16 000.000 da personoj. Ni supozu, ke nur la 10% de la subskribintoj aŭdis, aŭ eĉ sciis iomete pri Esperanto, do 1,6 milionoj; ni diru, ke nur 10% estis esperantistoj, kiuj parolis iom esperante, eble korespondis, do 160.000. Ni supozu denove, ke nur 10% estis aktiva esperantisto, do 16.000. La duono de ĉi tiu anaro ne havas la eblecon pro diversaj kaŭzoj aĉeti la libron, do restas 8.000 personoj, esperantistoj; supozeble la duono ne ŝatas la poemojn, dramojn, do restas 4.000 esperantistoj, kiuj estas aktivaj (klubanoj) esperantistoj, havas la eblecon aĉeti librojn, eĉ ŝatas la literaturon (ankaŭ poemon), konas Julion Baghy kaj tamen inter ili, aŭ inter la tuta esperantistaro de la mondo ne estas 1.100 esperantistoj, kiujn interesas la verko de unu J. Baghy, kiu estas unu el niaj plej grandaj verkistoj, kiu estas la plej amata verkisto de Esperantujo pro lia facila, bona, Zamenhofa stilo.

Vere, oni vole-nevole demandas: ĉu ni bezonas esperantan literaturon? Kial verki esperantlingve, se eĉ la libro de Julio Baghy ne elĉerpiĝas en 1.100 ekzempleroj dum tri jaroj; kiel elĉerpiĝus la verko de iu nekonata, nova verkisto?

Ĉu la esperantistaro ne estas "leganta popolo"? Ĉu ni verkas nur por la ekspozicioj, montri al la neesperantistoj, ke jen: Esperanto havas tian, belan, grandan literaturon originalan kaj tradukitan; lernu Esperanton!

La "nepagipovaj" esperantistoj ĉiam avide legas la titolojn kaj la recenzojn de la aperintaj esperantaj libroj. Kaj vi "pagipovaj" esperantistoj, kiuj havas la eblecon havigi la trezorojn de nia literaturo, kiajn verkojn vi atendas? Ni ŝatus aŭdi vian opinion, "Vi nekonata, neleganta esperantisto".

D-ro I. NAGY, Hungarujo

S-ro Tibor Sekelj en la n-ro 1 skribis, ke APO bezonas pli da kompetentaj esperantistoj por disvastigi Esperanton en Azio kaj Afriko, ke la kunlaborantoj povas ricevi nur la vojaĝelspezojn kaj etan subvencion, kaj ke ili devas zorgi pri sia vivtenado.

Jes, la vojaĝelspezoj povas iomgrade malhelpi la disvastigon de Esperanto en tiuj ĉi du kontinentoj. Sed mi pensas, por ŝpari la monon, oni do povas inviti kursgvidantojn el najbaraj landoj aŭ eĉ en la sama lando. La longa vojaĝo por gvidi kursojn en iu malproksima lando estas tro malŝpara. La kursgvidantoj estu en la sama kontinento, aŭ eĉ en la sama lando.

Fakte, nun en Azio kaj Afriko jam estas multaj kompetentaj kaj lertaj esperantistoj (precipe en Japanujo) kaj nia jarlibro jam tion pruvis. Kial oni devas nepre inviti kursgvidantojn el Eŭropo? La gravegan laboron por disvastigi Esperanton en Azio kaj Afriko certe povos entrepreni aziaj kaj afrikaj esperantistoj. Dank' al s-ro Sekelj, s-ino Haudebine kaj aliaj laboremaj samideanoj, Esperanto jam grandskale disvastiĝis en Azio kaj Afriko. La daŭrigan laboron entreprenu ni — aziaj kaj afrikaj esperantistoj!

Armand Su

Pri la Esperanta Antologio

La Esperanta Antologio estas la unika poemaro de nia esperanta poetaro. Ĉiu poeziamanto trovas en ĝi verajn juvelojn. Post la legado de tiu ĉi valorega libro, mi rimarkis 2 mankojn:

1. La poemoj de kelkaj poetoj ne estas karakterizaj, aŭ ne estas iliaj plej bonaj poemoj; kontraŭe, la pli gravaj kaj karakterizaj mankas en la libro. Nature, tio okazis nur al kelkaj poetoj. Ekzemple, la poemoj de Stanislaw Braun kaj Leo Belmont prezentitaj de D-ro Kalocsay kaj reprezentitaj en "Norda Prismo" estas sendube pli karakterizaj ol tiuj en la libro. Belmont, nia gaja profeto (kiel D-ro Kalocsay lin tiel nomas) estas humorplena poeto, kaj ludis tre gravan rolon en nia poezio, sed li estis tiel malmulte prezentita en la Antologio, ke la legantoj apenaŭ povas ĝui lian humorecon dum la legado de unu sola poemeto.

2. Kelkaj poetoj ne havas lokon en la Antologio, kvankam ili ekverkis jam delonge antaŭ la prepariĝo de la Antologio, kiel d-rino Guglielminetti, nia talenta poetino, kiu nin jam plurfoje plezurigis per la belaj poemoj en "La Nica Literatura Revuo". Cetere, la talenta rusa poeto A. Logvin, kiu ekverkis en esperanto ankaŭ 30 jaroj, ŝajnis tute forgesita de ni, kaj li debutis nur en 1959 en "Norda Pris-

CED

**Centro de Esploro
kaj Dokumentado**

77. Grasmere Avenue, WEMBLEY, Middlesex, Anglujo
Telefono ARNold 90-81

1.668 ESPERANTO-ELSENDJOJ EN 1960

Laŭ la Statistiko, kiun faris s-ro G. Larglantier, kunlaboranto de CED pri la radio, en la jaro 1960 22 radio-stacioj de 13 landoj elsendis entute 1.668 programojn en la Internacia Lingvo. Temas nur pri la radio-stacioj, kiuj elsendas regulajn programojn en la Internacia Lingvo. La rekordon havas Radio Varsovio kun 366 programoj, kiuj daŭris entute 183 horojn. Sekvas Bern kun 208 programoj, kiuj tamen daŭris entute nur 17,20 horojn, dum Sofia havis 104 programojn, kiuj daŭris entute 43,20 horojn. La nombro de stacioj kaj landoj, kiuj elsendis en 1960, estas precize la sama kiel en 1959. En 1959 elsendis ankaŭ Stockholm, kiu ĉesigis siajn elsendojn en 1960, sed en 1960 aldoniĝis la elsendoj de "Voĉo de Ameriko". Tiu lasta havis entute 12 elsendojn, kiuj daŭris 6 horojn. Elstaran pozicion plue konservas la brazilaj radio-stacioj kaj la elsendoj de Radio Zagreb.

La radio-stacioj Natal, Rio de Janeiro kaj São Paulo en Brazilo, Parizo, Vigo (Hispanujo) elsendis ankaŭ kursojn de la Internacia Lingvo.

Ĉiuj Esperanto-elsendoj, ne kalkulante la sporadajn, daŭris entute 525 horojn.

Estas necese, ke la personoj parolantaj la Internacian Lingvon, skribu nepre de tempo al tempo, sed minimume unu fojon en la jaro, al la radio-stacioj, kiuj elsendas en Esperanto, pri siaj deziroj kaj impresoj.

ESPERANTO-STRATOJ

Okaze de la Zamenhof-Jaro pluraj pliaj stratoj aŭ placoj ricevis la nomon de D-ro L. L. Zamenhof aŭ Esperanto. S-ro R. Pennazio, la elstara kaj konata gvidanto de la Itala Informoficejo, kompile ĝisdatan liston de urboj, en kiuj troviĝas stratoj aŭ placoj kun la nomo Zamenhof aŭ Esperanto. CED komunikas ĉi tie nur la landojn kaj urbojn, en kiuj troviĝas tiaj stratoj aŭ placoj:

Argentino : 1. Venado Tuerto, 2. General Alvear
Aŭstrujo : 3. Graz, 4. Klagenfurt, 5. Radstädter Tauern, 6. Knittelfeld

Belgujo : 7. Antwerpen

Brazilo : 8. Belo Horizonte, 9. Porto Alegre (Placo), 10. Porto Alegre (Strato), 11. Coração de Jesús, 12. Campinas

Britujo : 13. Bournemouth

Bulgarujo : 14. Assenovgrad, 15. Slavjanovo, 16. Sofia, 17. Insulo "Esperanto", 18. Kubrat (Str. Es-

peranto), 19. Kubrat (Str. Zamenhof), 20. Polski Trambes, 21. Jambol, 22. Varna, 23. Pazarĝik, 24. Govedarci

Ĉeĥoslovakio : 25. Hradec Králové, 26. Doksy, 27. Bohumin, 28. Lázně Bělohrad

Francujo : 29. Alès, 30. Amiens, 31. Angers, 32. Arras, 33. Benyls-sur-Mer, 34. Boulogne-sur-Mer, 35. Cagnes-sur-Mer, 36. Cannes, 37. Commentry, 38. Hagondange, 39. Haumont, 40. Houilles, 41. Hyères, 42. Issy-les-Moulineaux, 43. Lievin, 44. Limoges, 45. Marly-les-Valenciennes, 46. Marseille, 47. Montbéliard, 48. Mulhouse, 49. Perpignan, 50. Romans-sur-Isère, 51. Rosendaël près Dunkerque, 52. Saint Raphaël, 53. Sotteville-les-Rouen, 54. Strasbourg-Bisheim, 55. Thiers, 56. Villeneuve St. George, 57. Viroflay, 58. Rivesaltes, 59. Rueil-Malmaison, 60. Baugé, 61. Bourg-de-Péage, 62. Montreuil-Belfroy, 63. St. Laurent-du-Var

Germanujo : 64. Dresden, 65. Düsseldorf, 66. Bad Neuenahr, 67. München, 68. Glinda, 69. Russelsheim, 70. Gross-Gerau, 71. Nürnberg, 72. Stockum, 73. Karlsruhe, 74. Stuttgart.

Hispanujo : 75. Valencia, 76. Palma de Mallorca, 77. Manresa, 78. Vilafranca del Panadè, 79. Chestre, 80. Fuentes de Ebro, 81. Sabadell

Hungarujo : 82. Miskolc, 83. Szeged, 84. Esztergom, 85. Budapest, 86. Pécs, 87. Debreczin, 88. Tatabánya

Israelo : 89. Nova Bjalistok, 90. Kfar Ata

Italujo : 91. Milano, 92. Bologna, 93. Pisticci, 94. Ragusa, 95. Alessandria, 96. Mirandola, 97. Roma, 98. Reggio Emilia, 99. Como, 100. Mantova, 101. Massa, 102. Pistoia

Jugoslavio : 103. Zagreb

Nederlando : 104. Amsterdam, 105. Arnhem, 106. Den Haag, 107. Rotterdam, 108. Krommenie, 109. Leeuwarden, 110. Zwolle

Pollando : 111. Warszawa (Str. Z.), 112. Warszawa (Str. E.), 113. Łódź, 114. Białystok, 115. Kraków, 116. Śródborów, 117. Zamosc, 118. Jelenia Góra, 119. Wielun, 120. Czystochowa, 121. Kutno, 122. Szopienice, 123. Gdańsk, 124. Szczecin, 125. Włocławek, 126. Ostrow-Wlkp - (En Jelenia Góra estas ankaŭ strato "Grabowski")

Svedujo : 127. Göteborg.

Entute, do estas 127 stratoj aŭ placoj kun la nomo Zamenhof aŭ Esperanto en 17 landoj. Eventualajn korektojn aŭ aldonojn al la supra listo bonvolu sendi al s-ro Renato Pennazio, Itala Esperanto-Federacio, Informoficejo, Casella Postale 248, Torino, Italujo.

Post kiam la supra teksto estis kompostita, alvenis informoj pri jenaj urboj: 128. Varese en Italujo; 129. Wien en Aŭstrujo; 130. Anderlecht en Belgujo; 131. Saint-Laurent-du-Var en Francujo; 132. Hamburg en Germanujo.

ZAMENHOF FOTO-SERVO

S-ro H. Thien, konstanta kunlaboranto de CED kaj gvidanto de la Zamenhof Foto-Servo posedas 225

fotojn, kiuj rilatas al D-ro L.L. Zamenhof kaj lia familio. La fotoj montras Zamenhof kiel knabon, studenton kaj plenaĝulon, memorŝtonojn ktp. La kolekto estas tre kompleta, sed eble troviĝas ie ankoraŭ fotoj, kiujn ne posedas s-ro Thien. Tial li petas ĉiujn, kiuj posedas fotojn aŭ malnovajn gazetojn, en kiuj tiaj fotoj estas reproduktitaj, sendi prunte ilin al li por reproduktigo. Ĉiu, kiu deziras ricevi la kompletan liston kun la priskribo de la 225 fotoj, sendu respondkuponon aŭ stelon al s-ro H. Thien, Uiterwaardenstraat 12/II, Amsterdam, Nederlando.

ESPERANTO-RESUMO DE GRAVA VERKO

La Instituto por Biologia kaj Kemia Esploro de Agrikulturaj Plantoj en Wageningen, Nederlando, ĵus publikigis 41-paĝan resumon de ĉiuj ĉapitroj de la Jarlibro de la Instituto en la Esperanto-traduko de D-do G. F. Makkink. Tiu ĉi resume estas precipe por tiuj alilandanoj, kiuj ne komprenas la anglan lingvon. La enkonduka informo interalie akcentas: "Ni esperas pli vaste konigi la laborojn de tiu ĉi Instituto per Esperanto La legado de Esperanto postulas tiom malmulte da antaŭstudo, ke la enhavo de tiu ĉi eldono estas facile atingebla por esploristoj en ĉiuj landoj".

La resumoj kaj la klarigoj de la ilustraĵoj kaj tabeloj en Esperanto estos senditaj al ĉiu post peto direktita al la Instituto. La Instituto esperas, ke precipe sciencistoj el orienteŭropaj kaj aziaj landoj havigos al si la Jarlibron kun la Esperanto-resumo.

Plia grava scienca publikaĵo, kiu utiligas la Internacian Lingvon!

DONACIOJ POR CED

	£	ŝ	p
La stato je la 28-a de novembro 1960	103	15	10
S-ro B. B. Beaumont, Britujo	2	0	0
S-ro Lance Thomson, Aŭstralio	5	0	0
S-ro Frank Thurgood, Britujo	10	0	0
S-ro Victor Sadler, Britujo	2	0	0
D-ro W. P. Roelofs, Nederlando	1	13	1
S-ro A. Watterstein, Germanujo	17	1	
S-ro E. Richter, Germanujo	4	8	
S-ro H. V. Rasmussen, Danlando	10	4	
S-ro A. Persson, Svedujo	18	11	
Gesinjoroj Holmes, Britujo	5	0	0

Stato la 31-an de decembro 1960 122- 9-11

CED tutkore dankas al ĉiuj, kiuj subtenis finance ĝian laboron en la jaro 1960, kaj esperas, ke ankaŭ en 1961 CED ĝuos materian subtenon de ĉiuj, kiuj komprenas la gravecon de ĝia laboro por antaŭenigo de la Internacia Lingvo. Tute specialan dankon al Gesinjoroj Holmes, kiuj okaze de la fondiĝo de CED la 1-an de januaro 1952 donis la unuan kontribuon kaj ekde tiam konstante helpis al CED. — Donacojn por CED akceptas la C.O. de U.E.A., ĉiuj ĉefdelegitoj kaj perantoj, aŭ rekte la Oficejo de CED je la nomo de ĝia direktoro.

RONDO "GRAJNOJ EN VENTO" POR ESTONTAJ GEINSTRUISTOJ

Al geprofesoroj kaj gejunuloj de porinstruistaj lernejoj!

Laŭ niaj informoj sur tiu ĉi problemo, neniam en la historio de Esperanto la intereso por la Internacia Lingvo estis tiel granda ĉe la tutmondaj instruistoj, kiel ĝi estas nun. En multaj landoj kursoj estas malfermataj en porinstruistaj lernejoj (seminarioj, "Normalaj Lernejoj"). Bedaŭrinde la kontaktoj inter tiuj lernejoj estas preskaŭ nulaj, kaj tio kaŭzas grandan malavantaĝon kaj perdon por nia Movado.

Tial "Grajnoj en vento", la interlernejaj rondoj, proponas la tujan efektivigon de rondo *ekskluzive* rezervita al la porinstruistaj lernejoj en la mondo. Ni ne atendu, ĉar la momento estas plej bona: la subskribinto akceptas fari la preparan organizon laboron kaj eldoni la unuan gazeton verkitan de gestudentoj en porinstruistaj lernejoj *jam la 1-an de junio proksima*. Tutevidente estas la tasko de profesoro aŭ profesorino en porinstruista lernejo gvidi tian fakan rondon, kaj mi estas certa, ke intereso sin anoncos ĉe la subskribinto por eldoni la sekvantajn kajerojn kaj gvidi la novan rondon. Tiu rondo estu la kerno por estontaj plej diversaj kulturaj interŝanĝoj.

Geprofesoroj en porinstruistaj lernejoj, sendu al ĉisuba adreso por la 1-a de junio 1961 en nombro 25 (dudekkvin) ekzempleroj kaj sur papero en la internacia formato 21 × 29,7 centimetroj *verkaĵojn kaj desegnaĵojn de viaj gejunuloj*. La verkoj estu plej diversaj, laŭ la laborprogramo de via porinstruista lernejo. Ili havu la nomon, aĝon kaj sekson de sia aŭtoro, ekz.: Jacqueline ROBERT, 17-jara studentino. Aldonu:

1. vian nomon kaj adreson
2. la nomon kaj adreson de la lernejo
3. ĉu "Mi estas preta gvidi la novan rondon".
ĉu "Mi deziras nur partopreni".

FINANCOJ. Kiam la rondo estos organizita, ĉiu partoprenanta klaso, pro diversaj elspezoj, sendos ĉiujare al sia rondestro 12 (dekdu) internaciajn respondkuponojn. aŭ pagos al li en nacia mono la valoron de 12 int. resp. kup. (20 "steloj" de Universala Ligo). Por la sendo de la unua ekzemplero oni sendu al la subskribinto 3 int. resp. kup.

Ĉiujare la nova rondo eldonos 3 kajerojn, nome la 1-an de juni, 1-an de novembro kaj 1-an de marto, tute same kiel en la aliaj rondoj de la organizo "Grajnoj en vento". Sendu nur per poŝto "Registrita". La tarifo postulenda ĉe via poŝtoŝejo estas la *speciala tarifo por lernejoj*, t.e. la tarifo por "komercaj paperaĵoj" aŭ presaĵoj, (sen letero en la pakaĵo kaj facile malfermebla de la doganisto!).

Geprofesoroj en instruistaj lernejoj, ek al la laboro por fruktodonaj interŝanĝoj inter la estontaj geinstruistoj de la tuta mondo!

ADRESO provizora: "Grajnoj en vento", Marcel Erbetta, rue des Pins 66, Bienne/Biel 7, Svislando/Suisse.

KOREKTO

En nia marta numero, sur la p. 47, ni presigis alvokon "La lingvoproblemoj en la Internaciaj Kongresoj de la Mondasocio de Mondfederalistoj". Kiel subskribintoj de tiu alvoko aperis la nomoj de D-r H. J. Nannen kaj Mag. G. H. Slotemaker de Bruine. Bedaŭrinde dum la prespretigo de tiu numero elfalis tria nomo, tiu de s-ino Julia Isbrucker. Ni esperas, ke tiu ĉi eraro ne kaŭzis ĝenojn al la koncerna sinjorino, kaj petas ŝian pardonon.

La redakcio

Novaj Libroj

Duope ricevitaĵn ni recenzas; unuope ricevitaĵn ni nur mencias.

*) ricevebla ĉe U.E.A.

Castro Alves : ELEKTITAJ POEMOJ.*
El la portugala tradukis L. H. Knoedt.
Eld. Universitato de Bahia (Ministerio de Edukado kaj Kulturo), 1959. 186p.
23.5 × 16.5 cm. La libro estas havebla kontraŭ alilandaj libroj aŭ binditaĵjarkolektoj de revuoj, proksimume samvaloraj al 20 steloj por ekzemplero, de : Associação Baiana de Esperanto, Av. 7 de Setembro, 28, Salvador, Bahia, Brazilo.

Proksimume unu fojon en dek jaroj tio okazas — nome, ke subite el la pura ĉielo alvenas sur la recenzistan tablon majstroverko majstre tradukita de tute nekonita talentulo, kiu tuj per tiu unu paŝo prenas lokon sur la pinto de nia parnas. Lastfoje tio okazis al mi en 1951, kiam aperis "Peer Gynt" en traduko de E. A. Haugen. Hodiaŭ tio denove okazis per la debuta volumo de L. H. Knoedt. Mi ne hontas konfesi, ke plurfoje, dum legado de la "Elektitaj poemoj", mi preskaŭ eklarmis pro plezuro. Ho dioj! — malofta travivaĵo, por kiu mi plenkore dankas ne nur la tradukinton, sed ankaŭ la estimatan Rektoron de la Universitato de Bahia, sub kies egido eldoniĝis la volumo.

La "Elektitaj poemoj" pruvas ankoraŭ unu fojon la grandan valoron de la Internacia Lingvo kiel diskonigilo de verkoj gravaj, pli-malpli neglektitaj ekster la propra lingva tereno. Por tiu celo Esperanto estas la sola perfekta instrumento, kiam la uzanto havas, kiel L. H. Knoedt, la necesan genion. Castro Alves naskiĝis en Brazilo en 1847, kaj mortis en 1871, nur 24-jara; li do aliĝas al tiu granda grupo de promesplenaj geniaj poetoj, kiuj mortis antaŭ ol la talentego povis plene disvolviĝi. Sed, kiel ĉe multaj ftizuloj, la konscio pri ombranta morto sendube streĉis la junan poeton ĝis rapida, febra evoluo. Oni povas nur miri pri la abunde verŝitaj, vigle kolorplenaj poemoj, kiujn la juna mortonto testamentis al baraktanta homaro. En malfacilaj politikaj cirkonstancoj, Castro Alves, kiel Petöfi, Shelley kaj multaj aliaj, estis profunde homama, agita socia poeto; sed, estante juna, li estis ankaŭ, kiel la nomitaj kolegoj, pasia vivanto kaj amanto, en kies pokalo feĉis ĉiam amargusto de la mortkonscio. Riĉa esprimrimedaro, facila klereco, karakterizas liajn verkojn.

Karakterizas la tradukinton similaj

te al la poezio de Esperanto, kies verkojn kaj tradiciojn li evidente intime ekkonis antaŭ ol entrepreni mem tiel gravan taskon. Lia sinteno al sia laboro estas do plene profesia kaj serioza, kaj li neniam permesus al si prezenti ion malpli ol la plej bonan. Interalie li starigis al si ankaŭ la necesan kriterion, transdoni ne nur la enhavon, sed ankaŭ plej fidele la formon, de la tradukotaj poemoj, kaj pro tio la leganto povas fidi, ke li aŭskultas la aŭtentikan voĉon de Castro Alves. Li eluzas ĉiujn eblecojn de nia poezia lingvo, sed, plej grave, la komprenas tion, kion li uzas.

Elekti specimenon el la verko estas malfacile, ĉar la plimultaj poemoj estas longaj kaj longversaj. Sed "La naĝanto" eble konigos la trajtojn de la poeto kaj lia tradukinto.

(Notoj : *Seol* = submondo de la antikvaj hebreoj, laŭ ekz-e la Predikanto; *bojsiningo* = granda sudamerika serpento.)

La NAĜANTO

*Li en riveron plonĝas.
La ond' en du ŝiriĝas;
ĉirkaŭe kuntiriĝas
de la naĝanto, spasme...
Kaj malfermiĝas poste
funebra rond' simbola...
Ĝi estas faŭk' ŝeola,
ridanta nun sarkasme!*

*Sed ne. El profundego
aperas pala vango,
Neptunvizaĝ' sen sango,
ondkrestojn superregas.
Rigardas barkon foran
en la krepusko pala...
Kaj per muskolo ŝtala
riveron malfermegas.*

*Ondeg'! Delil' perfida!
Vi nian tombon fosas,
dum via brak' nin ŝlosas
en ŝajna amtenero!
Naĝant' kuraĝa — viajn
lazurajn mamojn tuŝas...
la perlojn — mokdispuŝas
de via koliero!*

*Ondeg'! vin klinu treme!
Disfendu vin, timida,
sub forta brak' avida
de vir' sen timosento!...
Olimpe bela, forta,
— humida har' flirtanta —
ŝvelinta brak' giganta...
Li estas reĝ' de l' vento!*

*Sed ve! proksime muĝas
torento nun, horore,
samkiel ekvatore
de bojsininga blek'...
Jen kie la rivero,
— ĉevalo ukraina —
per salto halucina,
en maron plonĝas ek.*

*Cu tremis vi? Neni! !
Torentomuĝ' ne gravas!
Vi for idolon havas,
samcelas via kor'...
Sur dors' humida rajdu
de ĉi ĉeval' titana...
— Mazepa oceana —
Al for'! al for'! al for'!*

Certe legantoj de tiu ĉi volumo volonte skribos al la rektoro de la universitato de Bahia (Prof. Edgard Rego Santos, Reitoria da Universidade da Bahia, Salvador, Brazilo) sian opinion pri la libro, kaj petos pri novaj eldonaĵoj en Esperanto fare de la Universitato.

W. Auld

ANIMO PRISMA* de Sylla Chaves.
Originalaj poemoj. Eld. Kultura Kooperativo de Esperantistoj. Rio de Janeiro, 1960. 112p. 21 × 15. Prezo 3,75 gld.

Jen nova, agrabla poemaro, ĉi-foje de la juna brazilano Chaves. La poezio de Esperanto estas jam tute matura, ĝi atingis tiun nivelon, ke ni rajtas atendi de ĉiu nova poezia verko iom pli ol rutinan versfaradon. Ni rajtas atendi, ke nova poezia verko en nia lingvo plenumu du minimumajn kondiĉojn: ĝi baziĝu firme sur la tradicio de nia poezio, kaj ĝi aldonu novajn, individuajn tonojn de kompetenta, individueca poeto. Kun plezuro mi konstatas, ke "Animo prisma" nepre plenumas tiujn du kondiĉojn, kaj ĝi donos plezuron al ĉiuj siaj legantoj.

En la libro troviĝas kvar longetaj poemcikloj ĉirkaŭ la temoj Aspiro, Deiro, Deziro, Deliro. Sekvas dekdek sonetoj kaj kvar aliaj poemoj. Inter la sonetoj estas kelkaj rutinaĵoj, sed pli da vere belaj ekzemploj de tiu majstra formo:

*Homaro sangas dum la milit'
eterna pluas.
Popoloj, rasoj, klasoj, sen halt'
kaj sen ŝirmilo,
klopodas venki l' ombron, je serĉo
de Sunbrilo,
sed dum agadas tiel, konstante
sin detruas.*

*La kampo fajras vane...
la sango vane fluas...
La celon ne atingas la frap',
kaj kun trankvilo
terure super ĉiuj ŝvebadas la flugilo
de l' spektro de Mensogo... kaj
senkompate ĝuas.*

*Mi ankaŭ enskribiĝis por
Krucbatal' ĉiama,
freneze atakante per mia spado flama
la beston, kiu loĝas en homa
korprofund',*

sed mi vundiĝas meme pro
 l' homa agonio...
 kaj l' glavo ruĝa brulas...
 Mi volus, mia Dio,
 Malbonon dispecigi... sen ies
 ajna vund'!

Interesa kaj (precipe ĉe "Vespero")
 sukcesa spritviglaĵo estas la tri sone-
 toj, ĉe kiuj la versoj konsistas el...
 po unu silabo.

Tamen, estas ĝuste en la poemcikloj,
 ke aŭdiĝas la firma voĉo de la indi-
 viduo Chaves. Tiu voĉo estas aŭten-
 tika, kaj resonas ofte trafikaj figuroj:

*Tra l' branĉ-ostaro
 en histerio*

kadavre straba luna glacio...

Ĝi estas voĉo iel naiva (mi uzas tiun
 terminon tamen sen ia ajn nuanco de
 malŝato) kaj, kvankam liaj versoj
 apartenas al la hodiaŭo, tiuj, kiuj ti-
 mas poezilingvajn arkanojn, ĉifoje po-
 vas tute maltimi, ĉar Chaves tre klare
 sin esprimas. Se io ŝajnas kritikinda,
 ĝi estas tio, ke kelkfoje li ŝajnas for-
 luliĝi sur la facilaj brakoj de la troa
 rimado. Plurfoje tio efikiĝas tre trafe:

*Mi jam scivolis pri la vivkial'
 kaj drivas ja de dubo al
 pligranda dubo
 de nub' al nubo
 de tag-inkub' al nokt-inkubo,*

sed alifoje tio sentiĝas iom malplenece-
 tedece:

*Sonas tria
 Sonas kvara
 Lit' glacia
 Viv' amara
 Nokto plia
 melankolia dezert' homara
 Min banas luno kiel mi senpara.*

Povas esti, ke tiu kritiko nur spegu-
 las mian subjektivan reagon. Legan-
 toj de nia poezio (kaj ili estas ne mal-
 multaj) nepre ne malatentu tiun ĉi de-

butan kolekton de nova talento!

La Kultura Kooperativo estas gra-
 tulinda pro bele presita libro. Tiu
 Kooperativo ne nur jam havas pro-
 pran sidejon, sed eĉ propran presejon!
 Forton al ĝiaj muskoloj!

W. Auld

Geraldo Mattos: *MINIATUROJ**. Eld.
 Kultura Kooperativo de Esperantistoj,
 Rio de Janeiro, 1959. 77p. 16 × 11.3 cm.
 Prezo: 1,25 gld.

La 31-silaba japana utao, aŭ "japa-
 nesko" jam delonge radikigis en nia
 originala poezio, kaj tre multaj okci-
 dentaj esperantistaj poetoj provis kap-
 ti la nuancecon, rafinon kaj sugestiv-
 von de tiu miniatura formo. Nun la
 konata brazilano Mattos eldonis ko-
 lekton de 36 da ili. Ĉarma volumo, en
 kiu li kantas jen la naturon:

*Kiun naturo
 funebras tiel triste,
 ke tra ĉielo
 testudas nuboj nigraj
 kaj larmas pluŭ' insiste?*

jen la erotikon:

*Bekfrapas vigle
 birdido ovopilkon:
 pli frape pikas
 la pintoj de la mamoj
 vian korsajan silkon...*

jen la seniluziigon:

*Min tukosvinge
 revokas ŝia pento?
 Mi fuŝe pensas:
 la tukon en fenestro
 balancas nur la vento...*

Frandaĵo por la belamanto.

W.A.

Josef Cink: *JUNULARA KANTARE-
 TO** Eld. Esperanto-Rondeto ĉe Kul-
 turdomo de ROH en Ostrava-Poruba,
 CSR, 1960. Prezo: 6 steloj. 48 p.
 20x14 cm.

KANTO POR NI, *Kajero 3** Eld. Slo-
 venia Esperanto-Ligo, Ljubljana, 1960.

Por junulara kantĥoro preparis Prof.
 A. Papler. 28p. 21ĝ15 cm. Prezo nemon-
 trita.

Kiam oni pripensas, kiom disigite
 vivas la esperantistoj; kiam oni kon-
 statas, ke nia "popolo" loĝas sur la
 tuta terglobo, kaj ke niaj renkontiĝoj
 estas *relative* maloftaj — kaj por mul-
 taj el ni neniam eĉ okazas! — estas
 mirinde, kiel unueca estas nia kant-
 tradicio, kaj kiel sufiĉe granda nombro
 da kantoj estas komuna al la esperan-
 tistoj tra la mondo! Kaj vere ne ĉiam
 temas pri kantoj jam tre konataj in-
 ternacie en nacilingvo. Tre multaj
 landoj aldonis sian kvoton al la espe-
 ranta stoko, kaj la modo ne multe in-
 fluas ĝin. Multaj el niaj plej ŝatataj
 kantoj estis tradukitaj tre frue, kaj
 fariĝis posedaĵo de niaj postaj gene-
 racioj. Kaj komunaj kantoj formas
 fortan ligilon en ĉiu lingva komunum-
 o, ne malplej en la esperanta.

La du kolektoj, kiujn mi nun recen-
 zas, estas bela miksaĵo de la konataj
 kaj nekonataj kantoj. Ambaŭ estas
 treege rekomendindaj, ĉar ambaŭ en-
 havas ankaŭ la muziknotojn, sen kiuj
 tia kolekto tre ofte perdas sian gran-
 dan utilecon. "Junulara kantareto"
 enhavas 54 kantojn el 16 landoj (in-
 kluzive Esperantujo), inter kies por
 mi novaj mi trovis plurajn ĉarmajn:
 "Bonan nokton" (ĉeĥa); "La luno su-
 per la kastelruinoj" (japana); kaj "Di-
 ru la vorton" (irlanda); k.a. La kolekto
 "Kanto por ni" estas ellaborita por
 kantĥoro en du, tri aŭ kvar voĉoj.
 Kiu jam aŭdis jugoslaviajn kantĥo-
 rojn, tiu jam scias, ke la aranĝoj es-
 tas belegaj, kaj tiel estas ankaŭ rilate
 la nunan kolekton kiu kovras vastan
 gamon de temoj kaj humoroj.

Ambaŭ libretoj estas nepre reko-
 mendindaj.

W.A.

Belarta Konkurso 1960

Tradukita Poezio, Unua premio

P. C. HOOFT, (1581 / 1647)

Adiaŭa Kanto

— "Cu do neniam plu min trafos post ĉi horo
 via okula bril' kaj arda lipfavoro?"

*Via okula bril' kaj arda lipfavoro
 kaj plena amfeliĉ' de via eta koro?*

*Kiel subulo via mi tamen ĉiam vivos,
 sed kien miaj sentoj en ĉi konfuzo drivos?*

*La sentoj drive drivu kaj trenu pene sin,
 mi perdis gvidostelon, ho belulino, - vin!"*

*Tuj ekploreĝis ŝi, ne eblis plu reteno,
 vidiĝis ĉiu vang' sub longa larmoĉeno.*

*Sed povis pli la larmoj ol hela rid' kveranta:
 mildiĝis lia koro kruele suferanta.*

*Venuso, lă diino, per lunohela stelo,
 spionis la amaĵon kaj miris de l'fabelo:*

— "Se havas forton tian", ŝi diris, "homa ploro,
 kial do larmoj mankas al nia dia gloro?"

*Dum falis larm' post larmo, "atendu!" ŝi proponis,
 la rozojn elŝirante, kiuj la harojn kronis.*

*Kaj antaŭ ol pied' sur ili ekpromenis,
 varmetajn larmojn ŝi en frida roz' forprenis.*

— "Preferas mi difekti la kronajn rozfoliojn
 por fari perlojn brilajn kiuj mirigos diojn!"

*Kaj perliĝintaj larmoj, tuj post la lasta sono,
 ŝin kiel orelingoj ornamis sur la trono.*

*Magia zon' aŭ krono ne estas dipostulo,
 kiam ŝi larmjuvela sin vidas en spegulo.*

El la nederlanda tradukis Albert Samyn

PLANOJ POR TOKIO

Pasintan monaton ni ion rakontis pri la eblecoj ŝpari por la Kongreso en Tokio ĉe U.E.A. Nun ni diru kelkajn vortojn pri la vojaĝo.

Por eŭropanoj kun normala libertempo, pro la tempo la sola trafikilo sendube estos la aviadilo. Nur personoj, kiuj povas mem disponi pri sia tempo, povos fari la plursemajnan vojaĝon per ŝipo.

Kutime, al Kongresoj en Eŭropo la landaj asocioj aranĝas karavanojn. En tiu ĉi kazo estas dubo ĉu el unu sola lando partoprenos tiom da personoj, ke tia karavano estos realigebla. Tial U.E.A. intencas kunordigi kaj centrigi la organizon de la vojaĝo. Tiamaniere estos eble kolekti el la diversaj eŭropaj landoj tian nombron, ke aranĝebla estos internacia karavano per luita aviadilo, kun maksimumaj garantioj kaj minimumaj kostoj.

Estas klare, ke ankoraŭ ne estas anoncblaj la prezoj validaj post kvar jaroj, sed en la nuna momento estas antaŭvideble, ke bezonata estos sumo inter 2000 kaj 3000 ned. gld. (8000-12000 steloj) por la vojaĝo kaj dumkongresa restado.

Kondiĉo de la flugkompanio estas, ke la karavananoj estos de du jaroj membroj de U.E.A.

De nun ĝis la 50-a restas al ni ankoraŭ kvindeko da monatoj. Jam estas eble kalkuli, kiom proksimume necesos ŝpari ĉiumonate!

Estas kompreneble, ke ne eblas nun jam anonci sin por tiu vojaĝo. Sed estus tre dezirinde ke tiuj, kiuj surbaze de la supre menciitaj faktoj pensas pri partopreno, anoncu tion al la Centra Oficejo.

Tiu provizora anonco neniel signifos ian sindevigon. Ĝi servos nur por ricevi impreson pri la nombro da potencialaj partoprenontoj. Scio pri tiu proksimuma nombro estos grava por la cetera preparado kaj por la klopodoj por plia reduktado de la kostoj. Tial, volonte la C.O., Eendrachsweg 7, Rotterdam, Nederlando, atendos viajn informojn!

M. H. Vermaas,
Direktoro C.O.

AL ĈIUJ ESPERANTISTOJ EN LA URBOJ HAMMER-SMITH, ANDERLECHT, NEUKÖLLN KAJ BOULOGNE-BILLANCOURT.

La supremenciitaj lokoj estas antaŭurboj de resp. Londono, Bruselo, Berlino kaj Parizo. Antaŭ kvin jaroj la aŭtoritatoj de tiuj lokoj kaj de Zaandam, antaŭurbo de Amsterdam, "ĝemeligis" siajn kvin antaŭurbojn de eŭropaj ĉefurboj per solenaĵo kaj granda renkontiĝo en Boulogne-Billancourt. Ampleksa artikolo pri tio aperis siatempe en la januara numero 1956 de La Praktiko. En postaj jaroj okazis similaj renkontiĝoj en aliaj urboj kaj la kvinjara jubileo de la "ĝemeliĝo" estos festata en Zaandam, Nederlando, de 28.6. ĝis 2.7.61. La oficiala nomo de la festo, en kiu partoprenos ĉ. 2000 personoj el la kvin urboj, estas "Jumelage".

Dum kvin jaroj la tre vigla esperantistaro de Zaandam klopodis enkonduki en la "Jumelage" la uzadon de Esperanto, sed renkontadis terurajn antaŭjuĝojn kaj kontraŭstaron ĉe la aŭtoritatoj kaj la diverslokaj organizaj komitatoj. La celo de la "Jumelage" oficiale estas la kreo de amikaj rilatoj inter la enloĝantoj de la kvin urboj, i.a. pere de interŝanĝo de grandaj grupoj da personoj, kio povos kontribui al pli bonaj rilatoj, inter la popoloj de

Okcident-Eŭropo. Por tiu celo oni i.a. rekomendas al la enloĝantoj lerni almenaŭ unu el la lingvoj de la aliaj landoj, dum en la oficiala ceremonio ĉiu urbestro parolos en lingvo de unu el la aliaj "Jumelage"-urboj. Evidente tiuj urbestroj nenion scias pri la enketo inter eŭropaj urbestroj koncerne la Internacian Lingvon, nek pri ĝia rezulto.

En la nuna momento du membrinoj de la urbestro de Zaandam estas lernantaj Esperanton kaj estas mem plene konvinkitaj pri la utilo de la lingvo por la "Jumelage". Sed provizore ankoraŭ ĝia voĉo estas ankoraŭ kiel tiu de vokanto en la dezerto.

Estas la arda deziro de ĉiuj esperantistoj kaj amikoj de Esperanto en Zaandam, ke kiom eble plej multaj esperantistoj el la kvar aliaj urboj partoprenu la "Jumelage", por ke ili povu en aparta aranĝo montri per la praktiko mem la funkciadon de Esperanto kaj la eblecon pere de ĝi krei verajn personajn kontaktojn kaj amikajn rilatojn. La programo de la tuta "Jumelage" estas belega kaj la partopreno ege malmultekosta pro diversaj avantaĝoj oficiale konsentitaj.

U.E.A. plej varme subtenas la strebadon de la Zaandam-anoj kaj alvokas ĉiujn esperantistojn en la koncernaj kvar lokoj aŭ mem partopreni, aŭ sendi skribajn aŭ sonbendajn kontribuojn kaj aliajn pruvojn de helpo kaj amikeco aŭ instigi partoprenontojn ne-esperantistajn ankoraŭ nun dediĉi kelkajn monatojn al facila rapidkurso en Esperanto. Helpe pruvi ke sen komuna lingvo "kontribuo al pli bonaj rilatoj inter la popoloj de Okcident-Eŭropo" restas nura teorio.

Por ĉiuj informoj oni turnu sin al la sekretario de la Zaandam-a Esperanto-Societo, S-ro Jan Vis, P. L. Takstraat 64, Zaandam, Nederlando.

LA INTERNACIAJ KONKURSOJ 1961

Stato je la 28-a de februaro

Konkurso I

	Lando	Kvoto	Poentoj	%
1.	Finnlando	2515	2005	79,72
2.	Britujo	6688	5216	77,99
3.	Svislando	2120	1590	75,—
4.	Svedujo	6325	4245	67,11
5.	Hispanujo	2585	1705	66,—
6.	Nederlando	5716	3745	65,52
7.	Usono	3660	2350	64,21
8.	Belgujo	2121	1299	61,24
9.	Danlando	3002	1833	61,06
10.	Francujo	7516	4443	59,11
11.	Japanujo	2860	1685	58,92
12.	Italujo	4247	2230	52,51
13.	Brazilo	5100	2473	48,49
14.	Germanujo	7490	3140	41,92
15.	Norvegujo	1993	810	40,64
16.	Jugoslavio	7150	60	—,84

Konkurso II

	Lando	Kvoto	Poentoj	%
1.	Kanado	665	555	83,46
2.	Israelo	250	190	76,—
3.	Portugalujo	535	365	68,22
4.	Aŭstrujo	1580	790	50,—
5.	Sudafriko	375	120	32,—
6.	Aŭstralio	1146	360	31,41
7.	Argentino	960	300	31,25
8.	Madagaskaro	250	75	30,—
9.	Urugvajo	250	75	30,—
10.	Islando	250	75	30,—
11.	Novzelando	965	255	26,42



LA JUNA VIVO

Cion por la redakcio de "L. J. V." sendu al :
Ivo Osibov
Sinjskih Žrtava 13/II, Split, Jugoslavio

PROBLEMOJ DE LA LATINA AMERIKO *Internacia seminario en Oldenburg de* **26-12-1960 - 1-1-1961**

Jam la kvaran fojon la Germana Esperanto-Junularo ebligis utilan kaj agrablan transiron en novan jaron, lastfoje en Oldenburg en la nordokcidenta Germanujo. La seminarion partoprenis 25 gejunuloj, junularaj gvidantoj el Britujo, Germanujo, Japanujo, Jugoslavio, Nederlando kaj Svedujo.

Ne plu junulo, sed partopreninto kiu grandparte kontribuis al la sukceso de la seminario, sinjoro Tibor Sekelj alportis en gastigeman lernejan hejmon la atmosferon de tutmondo kaj kiel ĉefpreleginto li plastike kaj aŭtentike prezentis al ni la Latinan Amerikon. Riĉa historio de tiu kontinento mirigis la seminarianojn, la aktualaj problemoj de hodiaŭ kaŭzis viglajn diskutojn. Tie estu menciita la diskuta pri la Kuba revolucio. lerte kaj taŭge gvidita de s-ro Uwe Joachim Moritz. Ni havis okazon aŭskulti sonbendan prelegon de s-ro J. Janoschka kaj la surbendigitan elsendon de la Voĉo de Ameriko pri kunlaboro inter la Amerikaj ŝtatoj. GEJ kiel la organizinto de la seminario skribis al esperantaj landaj organizaĵoj en la Latina Ameriko petante kontribuon. La Argentina Ligo plenumis ilian peton kaj du studentoj el Buenos Aires bonege kaj trafe prilaboris edukan sistemon en Argentino. Ilia kontribuo vekis ĉe seminarianoj specialan atenton kaj fortan aplaudon.

La partoprenintoj dankas al la Esperanto-Grupo el Oldenburg ne nur pro bona organizo de la seminario, sed ankaŭ pro iliaj klopodoj kiom eble plej bone konatigi al ni la landon en kiu ni pasigis la lastan semajnon de la 1960 a. Ili sukcesis: la prelego de s-ro Dieter Meiners, aŭtobusa rondveturo tra la urbo, vizito en fabriko de AEG, ekskurso en la ĉirkaŭaĵon de la seminariejo kaj aparte la akcepto ĉe la supera urbdirektoro de Oldenburg, s-ro Eilers kiu donacis al ĉiu seminariano belan libron pri... urbo hieraŭ, hodiaŭ kaj morgaŭ. Ĉio ĉi alproksimigis al ni aliel ne tre konatan landon de Oldenburg, ĉio kontribuis, ke la sento de fremdeco malaperis.

Ne nur temis pri la Latina Ameriko; dum libera tempo diversaj temoj estis aktualaj, ĉio kio interesas la gejunulojn.... Pro kelkaj fervoraj lingvistoj oni kompreneble ekbatalis ankaŭ

pri..... Jes, ni ankaŭ kantis, ludis kaj okazis Silvestra balo kaj post ĝi la ekskurso, k.t.p.

Ankaŭ la ĉijara seminario trafis sian celon kaj la esperantistoj bezonas kiom eble pli multajn tiajn aranĝojn. Nur sugesto: la problemaro de unu tuta kontinento estas tre ampleksa kaj tio ne permesas pli profunde pritrakti unu aŭ alian problemon. Eble oni prenu kiel ĉefajn nur kelkajn problemojn aŭ oni pritraktu pli malgrandan teritorion.

Jam nun ĝojiga informo: la 5-a IS de GEJ okazos fine de tiu ĉi jaro en Köln.

Svobodan Zlatnar

INFORMAJ AFIŜOJ EN UNIVERSITATOJ

La Studenta Esperanto-Klubo en Kopenhago komencis utiligi novan metodon por propagandi la laboron de la klubo kaj la Internacian Lingvon, nome por disdonado kaj pendigo de informaj afiŝoj. Tiu propagando kostas al la klubo eĉ nenion ajn, ĉar ni sukcesis interesigi unu el la plej grandaj librovendejoj de la dana ĉefurbo pri nia projekto, tiel ke la librovendejo senpage presas niajn afiŝojn, dum ni — kompreneble — permesas rekompence sur la afiŝo kelkajn reklamajn vortojn por la librejo. La afiŝojn ni pendigas en ĉiuj fakultatoj de la universitato, en la teknikaj kaj komerca altlernejoj, kaj en ĉiuj manĝosalonoj; domoj kaj klubejoj por studentoj; nombron da afiŝoj ni disdonas.

Ni ne aperigas afiŝojn pri ĉiuj niaj kunvenoj, ĉar tion la librovendejo (aŭ ĝia ekonomio!) ne permesas; sed ni aperigas afiŝojn unue kaj ĉefe pri la universitata kurso de la klubo kaj pri la plej gravaj ĝiaj aranĝoj; ekz. eksterlandaj prelegoj, Zamenhof-festo k.s. Ĉar ni uzas nur la Internacian Lingvon en niaj kunvenoj, ne venas multaj studentoj neesperantistaj; tamen la afiŝoj montras al la studentoj kaj profesoroj la vivon de la Internacia Lingvo kaj la viglan ekziston de la klubo, kaj ni scias, ke ili vekas intereson kaj diskutojn. Tial ni atendas multajn novajn lernantojn kaj membrojn en nia klubo venontaŭtune.

Fine ni rekomendas al ĉiuj studentaj kluboj similan kunlaboron kun librovendejo, ĵurnalo aŭ alia entrepreno.

La propagando estas por la klubo senpaga, kaj ĝi bezonas nur kelkajn volontulojn por la pendigo kaj disdonado de la afiŝoj; sed la valoro de tia propagando sendube estas granda.

Eskil Svane

KIU KONTRIBUOS?

Fine de Majo 1961 en la 2-a geknaba politeknika gimnazio "K. Veliĉkov" - Pazarĝik, Bulgarujo, oni aranĝos "Matematikan vesperon" nur per materialo ricevita pere de Esperanto. La graveco de la entrepreno kaj la favoraj postsekvoj de ĝia sukceso por nia afero estas nediskuteblaj.

Al la organizantoj estas necesaj amuzaj matematikaj taskoj, matematikaj spritaĵoj, artifikaĵoj, sofismoj, humuraĵoj ktp. Ili povas rilati al kiu ajn branĉo de la homa vivo kaj scio, sed ili nepre entenu matematikan elementon.

Akceptata estas ankaŭ materialo en la angla, franca, rusa kaj germana lingvoj. Ĉiuj kontribuantoj nepre ricevos rekompence Esperanto-prospekton pri Bulgarujo.

Kies materialo estos pli interesa kaj riĉa, tiu ricevos specialan Esperantomatematikan eternan kalendareton. Kaj tiuj 3 kies kontribuoj estos la plej valoraj (speciala libro, broŝuro aŭ pli ol 15 taskoj) krom ĉio alia ricevos ankaŭ esperantan libron. Cion adresu al: Petko Arnaudov, str. N. Popkonstantinov 38, Pazarĝik, Bulgarujo.

Tra la Mondo

• Speciala agado de Esperantista Grupo pri la ĉefprojekto "Oriento-Okcidento" de U.N.E.S.K.O. En konformiteco kun la ĉefprojekto de UNESKO pri "reciproka aprezo de la kulturaj valoroj inter Okcidento kaj Oriento", la esperantista grupo de Angers (Francujo), organizas por siaj membroj kaj amikoj, serion de kulturaj vesperoj pri la orientaj popoloj (kun la helpo, laŭeble, de Esperantistoj kaj oficialaj servoj de la koncernaj landoj). Jam okazis vesperoj titolitaj: "Uzbekistan", "Unu tagon en Pekino" "La Ciganoj", "la Juda Popolo kaj Israelo". Aliaj programoj prepariĝas; oni ankaŭ antaŭvidas viziton al japanaj kolektoj en loka muzeo. Dum tiuj vesperoj estas legataj en esperanto (de pluraj legantoj), mallongaj tekstoj (dokumentaj kaj literaturaj); oni projekcias filmojn 16 m/m (franclingvajn) aŭ diapozitivojn (dulingve komentitajn); diskoj de tipa kaj folklora muziko estas aŭdigitaj kaj la ĉeestantoj povas rigardi en la ĉambrego mem, ekspozicion de fotoj, afiŝoj, gravuraĵoj, esperantistaj gazetoj aŭ libroj de aŭ pri la lando aŭ popolo.

Tiu agado multe interesas la membrojn kaj altiras la atenton — pro la

farata propagando — de la loka publiko kaj de la aŭtoritatoj.

Cetere, la esperantista grupo ricevas oficialan subvencion pro sia internacia aktiveco. Aliflanke, ĝi aliĝis al la franca federacio de la kluboj de amikoj de U.N.E.S.K.O.

● **Ankaŭ Varese**, la eleganta itala urbo bele kuŝanta inter la lagoj de la norda Lombardio, kaj sidejo de la 28a Itala Kongreso de Esperanto, en 1957, solenis la 18an de decembro last-



pasinta, la fermon de la Zamenhofa Jaro per inaŭguro de sia strato al D-ro Zamenhof. Kun la ĉeesto de la ĉefaj lokaj provincaj instancoj kaj de la Esperantistoj ne nur italaj, sed ankaŭ tiĉinaj (Svisaj), estis malkovrita stratsildo, videbla en la ĉiapuda bildo. Sekvis komuna tagmanĝo kun salutoj kaj dankoj, kaj posttagmeze interesa prelego de prof-ro Agostini el Bolonjo, en unu el la plej belaj salonoj de la urbo, kun la partopreno de multaj aŭskultantoj: do plene esperanta tago.

● **Sukcesa prelego de D-ro Hamvai**. La 13-an de februaro cento da personoj amasiĝis en la Societa Salono de Hénin-Liétard (Pas de Calais) por aŭskulti la prelegon de nia Nov-Zelanda S-ano. La temo estis: "Vivo de Maorioj". Tiu ĉi vesperprezento estis aranĝita de la esperantista sekcio de Amikaro de Gelernintoj kaj rezervita ne nur por esperantistoj, sed ankaŭ por la ĝenerala publiko. Interpretis la ankaŭparolon kaj la komentojn la loka kursgvidanto, S-ro Lucien Bourgois, el Noyelles-Godault. Krom la klubanoj, ni povis rimarki la ĉeeston de S-ro Philippe, Honorprezidanto de la Franca Esperanto-Asocio U.E.F., kiun akompanis pluraj Arras-anoj kaj grupeto verdstela el Valenciennes. Ankaŭ venis dek-duo da geinstruistoj kaj kelkaj gestudentoj el Hénin-Liétard. Ĉiuj aprecis la oratoran talenton de D-ro Hamvai kaj esprimis sian kontenton per varmaj aplaŭdoj. La belegaj koloraj diapozitivoj vekis ĉies admiron.

La morgaŭon, la loka gazetaro (tri ĵurnaloj) favore raportis.

● **La 39a Germana Esperanto-Kongreso** okazos je Pentekosto, de la 20a ĝis la 22a de majo 1961, en Bad Hersfeld en la mezo de Germanujo (hodiaŭ tute apude de la zona limo, en la okcidenta parto). Eksterlandaj samideanoj estas kore invitataj. Informojn volonte donas la LKK de la Kongreso en Bad Hersfeld, Unter der Stiegel 27 (Germanujo).

● **La Franc-Norda Esperanto-Federacio** kunvenos la 23an de aprilo en la kadro de la Internacia Foiro de la Komuna Merkato en Lille. Programon sendas S-ro L. Bougois, 27 Rue Gambetta, Noyelles-Godault (Pas-de-Calais), Francujo.

● **Esperanto-kurso en la gimnazio de Le Teil (Francujo)**. La 30an de novembro en la gimnazio de Le Teil, urbo apud Montelimar, komenciĝis nova E-kurso. Depost 3 jaroj la kurso regule okazas en tiu lernejo. 25 ĝelernantoj 14-17-jaraj sekvas la kurson. La 21an de decembro, la esperanta grupo de Montelimar invitis tiujn ĝejunulojn al festeto en la sidejo de la grupo. Lumigita kaj ornamita kristnaska arbo staris en angulo de la salono. Oni manĝis kukojn kaj trinkis blankan vinon, oni aŭdis per elektrofono esperantajn kantojn. La prezidanto de la grupo kaj gvidanto de la kurso rememoris la datrevenon de Zamenhof-naskiĝo kaj invitis la ĝejunulojn al fideleco al la Esperanto-idealo. Tri ĵurnalistoj vizitis la feston kaj faris fotojn. Bonega artikolo kun esperantlingva titolo "Gajan kristnaskon" kaj foto aperis en du tagĵurnaloj. Sendu salutkarton al la ĝejunuloj: Esperanto-rondo, Collège, Le Teil, Ardèche, Francujo.

● **Seminario esperantista en Hustedt**. En la popolaltlernejo Hustedt proksime de Celle (Germanujo, Malsupra Saksujo) okazos dum la paskaj ferioj de la 3-a ĝis la 8-a de aprilo la ĉiujara seminario esperantista organizota de la laborkomunumo de Esperanto-instruistoj de Malsupra Saksujo helpe de subvencio de la kulturministro. Multaj ĝesamideanoj — ankaŭ eksterlandanoj — jam partoprenis dum la pasintaj jaroj, multaj faris je la fino ekzamenon, multaj revenis plurfoje, ĉiuj estis kontentaj kaj ĝuis la kamaradecon en gaja rondo kaj bela naturo.

● **Speciala eldono de "The War Resister" ("La militrezistanto")**. Trijara raporto de War Resisters' International (Lansbury House, 88 Park Avenue, Enfield, Middlesex, Anglujo) aperis tute en Esperanto. 32p. Prezo ne indikita.

● **Junular-gastejo "Por paco" en Fredericia (Danlando)** la 25an de novembro fariĝis la unua Esperanto-gastejo por la junularo en Danujo, same kiel "Mjølfjell" fariĝis la unua de Norvegujo. Vizitu ilin post la U.K. en Harrogate! Kiu junular-gastejo de

via lando estos la unua, kiu adoptos Esperanton?

● **En Stuttgart (Germanujo)**, nova strato en la okcidenta parto de la urbo estas nomita "Zamenhof-straße".



La fotobildo montras la Esperanto-Grupon dum la inaŭguro de la Zamenhofstrato.



46-a Universala Kongreso de Esperanto

Harrogate 5.VIII - 12.VIII 1961 Britujo

6-A INTERNACIA INFANA KONGRESETO

Celo:

La Infana Kongreseto, kiel konstanta institucio de la Universalaj Kongresoj, celas eduki infanojn al internacia amikeco per aplikado de la komuna lingvo Esperanto. La Kongreseto daŭrigas la ekzemplon kaj la etoson de la esperantistaj familioj, kiuj en la ĉiutaga vivo uzadas la Internacian Lingvon. La Kongreseto ne estas lingva seminario: do, ĝi ne akceptas infanojn, kiuj ne povas memstare paroli en Esperanto. Ĝi ne estas infangardejo aŭ vartejo, en kiu trookupitaj kongresanoj lasas siajn infanojn. Ĝi estas edukejo, kie la esperantistaj etuloj ek de la fruaj jaroj spertas, en atmosfero de festa sed disciplinita libereco, internacian komunan vivon kaj tutmondan solidarecon, preter rasaj, naciaj, religiaj aŭ aliaj apartigoj. La Kongreseto celas kuraĝigi la esperantistajn familiojn instrui Esperanton al siaj infanoj, krei kontakton inter la diverslandaj infanoj, kiuj jam konas la Internacian Lingvon, kaj montri al la neesperantistoj la servojn de Esperanto por pli bona internacia kompreniĝado.

Datoj :

La Infana Kongreseto okazos en Harrogate de sabato, la 5-a de aŭgusto, je la 8,00 h. ĝis sabato, la 12-a de aŭgusto 1961, je la 12-a h. Lasta limdato por aliĝi estas la 30-a de junio 1961.

Kondiĉoj :

La Infana Kongreseto estas nepre rezervita al infanoj de 6 ĝis 13 jaroj, kun eventualaj esceptoj en specialaj kazoj. Spite de la plurfoje ripetitaj avertoj, en la pasintaj jaroj daŭre aliĝis infanoj kun nesufiĉaj lingvokonoj: por eviti bedaŭrindajn rifuzojn eĉ post la starto de la Kongreseto, estas rekomendinde, ke la gepatroj evitu aligi etulojn nekontentige preparitajn. Laŭ ebleco, la infanoj estos dividitaj en du grupojn laŭ aĝo kaj miksitaj en diversnaciajn "familiojn".

Kotizoj :

Kontribuo al la restadkosto estas fiksita je 4 anglaj pundoj, pagendaj samtempe kun la aliĝo. Du aŭ pluraj infanoj el sama familio pagas nur po 3 pundoj kaj duono. Limigita nombro da infanoj estos invitita per la fondaĵo "Adoptaj Gepatroj". La Universala Kongreso subvencias sian Kongreseton kaj kovras ties deficiton.

Gvidantoj :

La infanoj estos prizorgataj de pedagogie spertaj komisiitoj el diversaj landoj.

Vizito :

Merkredon, la 9-an de aŭgusto, la Kongreseto akceptas gepatrojn, pedagogojn, ĵurnalistojn kaj ĉiujn interesitajn kongresanojn. Dum la vizito okazos informa prelegeto, sed neniu aparta programo. Ekster tiu tago, nur la gepatroj, korespondantaj geonkloj, legitimaj edukantoj rajtos viziti siajn infanojn inter la 19-a kaj 20-a h., escepte dum la ĵaŭda ekskursotago.

Prezentado :

La infanoj estos prezentataj al la kongresanoj dum simpla spektaklo, vendredon la 11-an de aŭgusto.

Programo :

La suba provizora skemo de taga programo estas farita kun rezervo pri ŝanĝoj laŭ la cirkonstancoj.

7,30 h. vekiĝo
8,15 h. matenmanĝo
9,00 h. promenadoj aŭ ekskursoj
10,30 h. manĝeto
13,00 h. manĝo
14,00 h. ripozo aŭ slojdoj
15,00 h. eksteraj ludoj aŭ sportoj
16,00 h. refreŝaĵoj
16,30 h. prezentadoj (filmoj, kantoj, diapozitivaj, ludoj, teatraĵoj)
19,00 h. vespermanĝo
20,00 h. libera tempo
20—21,30 enlitiĝo laŭ aĝo

Vegetaranoj kaj dietuloj estos zorgataj.

Balo :

Infana salutbalo okazos sabaton vespere, la 5-an de aŭgusto.

Teatraĵo :

La esperantista trupo de la Stata Teatro de Kielce (Pollando) ludos por la infanoj la teatraĵon de Jerzy Broszkiewicz "Granda, pli granda kaj plej granda".

Detaloj pri ekskursoj, filmoj, promenadoj, piknikoj kaj festoj estos ĝustatempe transdonitaj al iuj interesuloj.

Adoptaj gepatroj

Por helpi al esperantistaj infanoj el landoj malproksimaj aŭ kun malfortaj devizoj, la Loka Kongresa Komitato starigis la fondaĵon "Adoptaj Gepatroj", kun kotizo de 3 pundoj. La ricevataj sumoj estos utiligitaj nur por pagi la veturadon kaj la restadkoston al tiuj infanoj.

ESPERANTISTA VIVO**Gcedzigo**

Venkataraman-Muthuswamy. La 18an de januaro 1961 geedziĝis en Bombaĵo, Hindujo, s-ro **Mahalingam Venkataraman** kaj f-inĝ **Kalpagam Muthuswamy**. La novedzo estas unu el la plej lertaj esperantistoj en New Delhi, kaj estis bona helpanto de s-ino Haudebine kiam ŝi komencis sian laboron tie. (Adreso : A 178, Defence Colony, New-Delhi 3, Hindujo).

Naskiĝo

Puig. La Sekretario de Esperanto-Grupo Sabadell (Hispanujo), s-ro **Llibert Puig** kaj ties edzino Carme Cànovas, ĝojas pro la naskiĝo de dua filo kiu ricevis la nomon Hector, la 19an de januaro en Sabadell (Barcelona).

NEKROLOGO

Ashmore-Baker. La 21an de januaro 1961 mortis en Exeter, Britujo, s-ro **C. Ashmore-Baker**, esperantisto de 1920, en la aĝo de 94 jaroj.

George. La 15an de februaro estis enterigita en Besançon, Francujo, s-ro **Marcel George**, emerita profesoro pri franca lingvo en la Instruista Seminario de Besançon, kaj dum multaj jaroj varma propagandisto por nia lingvo. Esperantisto de 1936, li estis la unua prezidanto-fondinto de la grupo en Besançon, kaj de la federacio de Franche-Comté.

Roelofs. La 30an de januaro mortis en Bilthoven, Nederlando, s-ro **J. J. Roelofs**, patro de la redaktoro de "Scienca revuo", dum 30 jaroj membro de UEA.

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

EENDRACHTSWEG 7 ROTTERDAM-2 NEDERLANDO

OFICIALA INFORMILO

La 1-an de marto 1961

N-ro 336

STATISTIKO. Jen la stato de la membraro je la fino de februaro kaj ankaŭ por komparo je la fino de februaro 1960 :

	1960	1961
Asociaj membroj	4670	3033
Individuaj membroj		
MJ	509	522
MA	3536	3449
MS	423	360
Pat.	3	1
DM	348	406
HM	40	43
JMJ	19	15
JMA	124	91
	5002	4887
	9672	7920

DELEGITOJ

Vidu la baldaŭ aperontan Jarlibron 1961, Unuan Parton.

MEMBROJ-SUBTENANTOJ 1961

Jayet, F-ino E., Morges; 211. Sennhauser, Schwester, Basel, ĉiuj Svis-

lando; 212. Ballard, D-ro Francis E., Reseda; 213. Beard, S-ro Ralph H., Staten Island; 214. Bequet, S-ro C. A., New York; 215. Belinfante, S-ro D-ro F. J., West Lafayette; 216. Doneis, S-ro A. F., Pharr; 217. Forsberg, S-ro George E., San Mateo; 218. Neri, S-ro Raymond R., Stafford Springs; 219. Regal, S-ro Arthur E., Downers Grove; 220. Regal, F-ino Julie L., Downers Grove; 221. Simon, S-ro Werner, Memphis; 222. Sparks, Pastro Robert, Avon; 223. Tobusch, S-ro Herman, Chicago, ĉiuj Usono. 224. Maddern, S-ro I. T., Morwell, Aŭstralio, 225. Taylor, S-ro F. V., Parkville, Aŭstralio, 226. Degryse, S-ro A., Roeselare, Belgujo, 227. Albuquerque, D-ro J. de, Maceio, Brazilo, 228. Alves, S-ro A. dos Santos, Rio de Janeiro, Brazilo, 229. d'Amorim, S-ro D-ro Nid Dutra, Salvador, Brazilo, 230. Araujo, S-ro Get. Soares, Rio de Janeiro, Brazilo, 231. Araujo, F-ino I. Baggi de, Rio de Janeiro, Brazilo, 232. Augusto, S-ro O., Barra Mansa, Brazilo, 233. Bondarovsky, S-ro E., Barra Mansa, Brazilo, 234. Bondarovsky, S-ro S., Barra Mansa, Brazilo, 235. Braga, S-ro I. Go-

mes, Rio de Janeiro, Brazilo; 236. Costa, S-ro Fr. Ferreira da, Rio de Janeiro, Brazilo, 237. Coutinho, S-ro A. C., Rio de Janeiro, Brazilo, 238. Dionisio, S-ro C. H., São Leopoldo, Brazilo, 239. Drucker, S-ro G., Curitiba, Brazilo, 240. Flores, D-ro A., Volta Redonda, Brazilo, 241. Goes, S-ro Kap. Godofredo de Araujo, Salvador, Brazilo.

PATRONO

1. Domingues, D-ro C., Rio de Janeiro, Brazilo.

NOVA DUMVIVA MEMBRO

Hodge, F-ino M., Medindie, Aŭstralio.

FONDAJO PROF. CANUTO

Antaŭa stato : 70 MA kaj 8 MJ.
F-ino N. Hanson, Britujo, 1 MA;

RADIO

Ciujn informojn pri radio sendu al S-ro G. Larglantier, 29 Bd. Murat, PARIS 16, Francujo.

En la tabelo horoj de la dissendoj laŭ la horsistemo de Greenwich. Por Mez-Eŭropa tempo oni aldonu unu horon.

Mallongigoj : I = Informoj, P = Pollando, K = Kurso.	
Ĉiutage	15.30-16.00 Warszawa, 249m. (1205 kcs), 48.43m., 42.11m., 41.04m., 31.50m., 31.45m., 31.38m., 25.39m. Esperantaj disaŭdigoj, P. Pola Radio, Warszawa, Pollando.
Dimanĉo	10.50-11.00 Natal, 236m. (1270 kcs), 60.79m. K. Radio Poti, Av. Deodoro 245. Natal, Brazilo.
	14.00-14.15 Piraçununga, 198m. (1520 kcs). K. Rádio-Difusora ZYI 3, Piraçununga (Sao Paulo), Brazilo.
	19.00-19.25 Sofia, 41.35m, 39.11m. P. Radio Sofia, Bulgarujo.
	22.30-22.55 Sofia, 41.35m, 39.11m, 30.93m. P.
	23.40-24.00 Bilbao, 265m. (1133 kcs). P. Radio Bilbao, Hispanujo.
Lundo	23.45-24.00 Rio de Janeiro, 441m. (690 kcs), 92.30m, 60.30m. K.I. Radio Copacabana ZYP 20/27, Avenida Rio Branco 277-17, Rio de Janeiro, Brazilo.
	00.45-01.00 Juiz de Fora, 60.91m. I.P. Rádio Industrial, Rua Batista de Oliveira, 745, Juiz de Fora (Minas Gerais), Brazilo.
	17.30-17.35 Bern, 48.66m, 31.46m, 16.97 m. P. (D-ro Baur.) SRG., Kurzwellendienst, Neuengasse 23, Bern, Svislando.
	18.10-18.30 Valencia, 233m. (1233 kcs). P. La Voz de Levante, Valencia, Hispanujo.
	22.40-22.55 Hilversum, 402m. (746 kcs.) P. N.C.R.V., Schuttersweg 9, Hilversum, Nederlando (nur la unuan lundon de ĉiu monato).
Mardo	02.00-02.30 Caracas, 476 m. (630 kcs.), 48.62 m. P. Radiodifusora Nacional, Caracas (Venezuelo).
	11.55-12.00 Bern, 49.66m, 31.46m., 13.94m. P. (D-ro Baur).
	16.40-16.50 Wien. 513m. (594 kcs), 293m., (1025 kcs), 49m., 41m., 30m., 25m., 16m., 11m. I. Radio Wien, Argentinierstr. 30 a, Wien IV, Aŭstrujo.
	17.55-18.10 Roma. 50.34m., 41.24m., 30.90m. P. Radio Roma, Casella Postale 320, Roma, Italujo.
	17.55-18.10 Roma. Kiel marde.
Merkredo	23.00-23.15 Guatemala, 470m. (640 kcs), 49.54m, 30.98 m. I.K. Radio Nacional T.G.W., Guatemala Cd, Mezameriko.
	08.30-08.40 Paris, 290m. (1070 kcs), 235 m. (1277 kcs). K. Esperanto-Office, Orleans (Loiret), Francujo.
	11.55-12.00 Bern. Kiel marde P. (D-ro Privat).
	22.00-22.15 Zagreb, 264m. (1135 kcs). P. Radio-Zagreb, Jugoslavujo.
	23.30-24.00 São Paulo, 62.83m. I.K. Rádio Progresso, São Paulo, Brazilo.
Vendredo	17.30-17.35 Bern, Kiel lunde. P. (D-ro Privat).
	17.55-18.10 Roma. Kiel marde.
	22.00-22.10 Hilversum 298m. (1007 kcs). V.A.R.A., Heuvellaan 33, Hilversum, Nederlando.
Sabato	12.45-13.00 Rio de Janeiro, 214m. (1400 kcs) 31.42m., K.I. Radio Roquete Pinto, Av. Erasmo Braga 118, Rio de Janeiro, Brazilo.
	18.30-19.00 Rio de Janeiro, 375m. (800 kcs), 50.08m, 30.71m, 25.10m, 16.78m. K.I. Radio Ministério da Educação, Praça da República 141-A, Rio de Janeiro, Brazilo.

Radio Roma. 4-IV, Tra la literaturo; 7-4, "Reviviĝo", religia himno de A. Manzoni; 11-IV, Novaĵoj el Italujo; 14-IV; Leterkesto kaj bibliografio; 18-IV; Italaj kanzonoj en Esperanto; 21-IV, Romo kaj ĝiaj kanzonoj; 25-IV, Granda itala poeto Torquato Tasso kaj la dramo de lia vivo; 28-IV, Franciskana literaturo; Tomaso el Celano. Krome, ĉiun merkredon, kuriero de Esperanto.

Radio Zagreb. 6-IV, Rivero Sava de la elfluo ĝis la enfluo; 13-IV, Intervjuo de la la junaj astronomoj-esperantistoj; 20-IV, La jugoslaviaj komponistoj de la moderna muziko; 27-IV, Respondoj al korespondantoj kaj novaĵoj el la movado.

Voĉo de Ameriko. Lasta elsendo de la nuna serio : 7-an de Aprilo. Ĉiuj utilaj informoj pri ĉi-tiu programo aperis en la marta numero.

S-ino K. Olsson, Svedujo, 4 MA; Itala Instituto de Esperanto, 2 MA; S-ro Prof. C. Grazzini, Italujo, 1 MA; S-ro B. Lozzi, Italujo, 1 MA; D-ro R. Maltecca, Italujo, 1 MA; S-ro Prof. G. Facchi, Italujo, 1 MA kaj 1 MJ; S-roj D. kaj N. Bertoletti, Italujo, 3 MA kaj 1 MJ; S-ro F. Bertoletti, Italujo, 3 MA kaj 1 MJ; S-ro V. Foschian, Italujo, 1 MA; S-ro G. della Savia, Italujo, 1 MA; F-ino B. Marinaro, Italujo, 1 MJ; F-ino E. Bordogna, Italujo, 1 MJ; Grupo Giovanile Milanese, Italujo, 5 MJ; Cirkolo Esperantista Padovano, Italujo, 1 MJ; Ges-roj Laurie Britujo, 3 MA; F-ino Smith, Francujo, 1 MA; S-ino K. Berge, Norvegujo, 1 MA; S-ro R. inse, Svedujo, 1 MA; S-ro J. Comella, Hispanujo, 1 MA; S-ro W. D. B. Hackett, Kanado, 1 J. M. J.; S-ro J. Petersen, Danlando, 1 J. M. A., S-ro Tortel, Francujo, 1 MA; S-ro O. Nanni, Italujo, 2 MA; F-ino M. Boulton, Britujo, 1 MA; S-ro E. J. Laurie, Britujo, 1 MA.

Entute 100 MA, 19 MJ, 1 JMJ kaj 1 JMA je 1.3.1961.

Ĉiuj kontribuu por membrigi esperantistojn en nepagipovaj landoj, honore al la nobla prezidinto de U.E.A. (Vidu dec. no. "Esperanto", 1960).

FONDAJO ZAMENHOF

Antaŭa sumo : 18.561,30 gld.

S-ro H. Menner, Aŭstrujo, 4,35 gld.; S-ro F. Nawrátil, Aŭstrujo, 1,74 gld.; S-ro W. Gieseler, Germanujo, 2,80 gld.; S-ino E. Meyerhuber, Germanujo, 6,32 gld.; S-ro A. Bohigas, Hispanujo, —,63 gld.; S-ro A. Llinias, Hispanujo, 2,50 gld.; S-ro M. Martín, Hispanujo, 1,20 gld.; S-ro J. Perarnau, Hispanujo, 2,50 gld.; S-ro Kamman, Nederlando, 5,— gld.; S-ro R. Picado Pr., Portugalujo.

Entute 18.590,96 gld. je 1.3.1961.

Daŭrigu vian kontribuadon por subteni la plian agadon de la Asocio por firmigi la akiritajn poziciojn !

Al ĉiuj donacintoj tre koran dankon.

Direktorino C.O.
M. H. Vermaas

ANONCETOJ

Koresponda Servo Mondskala. (K.S.M.) 12, rue des Jacobins, Clermont-Fd (Pdd) Francujo. Petante gekorespondantojn, bonvolu preslitere skribi vian kompletan adreson kaj indiki viajn aĝon, profesion, ĉefajn interesojn kaj ĉiajn sciigojn, kiuj povas faciligi taŭgan peradon de korespondproponoj. Ĉiu korespondemulo rajtas senpage enskribiĝi, sed ne ricevos rektan respondon kaj devos pacienci ĝis kiam iu alia sendos al li korespondproponon pere de K.S.M. Interesuloj, kiuj deziras rekte ricevi adresojn, devos aldoni internacian respondkuponon por ĉiu petata adreso (aŭ francajn poŝtmarkojn je 0,50 NF). Atentu bone, ke la respondkuponon estu maldekstre stampita. — K.S.M. nur peras adresojn inter korespondemuloj sekve al rekta alskribo de la servo (vidu adreson ĉi-

pre) sed ne publikigas anoncojn en gazetoj aŭ informiloj. Tiucele bonvolu turni vin al la diversaj gazetoj aŭ al la "Kolektanta Rondo" 6, place J. Ferry, St. Etienne (Loire) Francujo.

D-ro Fred Williams petas siajn malnovajn korespondantojn uzi la novan adreson: 26 Hunter St., Malvern, Victoria, Aŭstralio. Li ne povas entrepreni novajn korespondadojn aŭ interŝanĝi poŝtmarkojn.

Belan frontispicon havas nova eldonaĵo "William Penn", majstra prelego de Prof. D-ro E. Privat. Eldonis Kvakera Esperantista Societo, Bath Road, Ventnor I. W., Anglujo. Prezo 3 resp. kup. aŭ 3 steloj.

Antaŭ Harrogate - Londono! Oficiala Antaŭkongreso kaj Seminario "Oriento-Okcidento". Prospekton petu de S-ro V. Sadler, 1 Poet's Road, Highbury, London, N.5. Ne prokrastu!

Esperanto-Civito. Fonduso por aĉeti unuan domon atingis 893 stelojn. Celas ankaŭ venki teruran apation en la urbo Dovro. Urbestro favoras en konsilantaro, sed doganistoj, fervojistoj kaj ŝipanoj "neniam vidis esperantiston depost 1905". Vin montru kaj anoncu jam antaŭe al D. Soleo, 14 B Castle Avenue, Dover, Britujo.

La nova kristaneco, bazita je la doktrino de sciencisto kaj reformanto, E. Swedenborg, enportas certan lumon en la homan animon pri la postmorta vivo kaj pri vera religio bazita je la Biblio kaj ĝia interna senco. Ĝi akordigas la religion kun la scienco. Pos-

tulu traktatojn senpage. Aldonu, se eble, resp. kuponon. Adresu: Jan B. Vlach, Lužická 21, Praha II, Ĉeĥoslovakio.

Esperanto-Parolata 1959—1961: tutmonda Adresaro. Mendu ĉe Libroservo. Ankaŭ: S-ro Rétot, 162 Bulvarado A. Briand, Montreuil (Seine), Franclando: 3 rpk = 4 steloj = 1,40 NF: Poŝtkonto 1042-07 Paris.

Esperanto: Mi volas aĉeti n-ojn 344, 347, 348, 364—381, 384—405, 407—424, 426—485, 491, 495—506. Dr. W. Lippmann, Grillparzerstr. 4, Hamburg.

S-ro E. Juncosa, Str. Brutau, 183-2^o-1a, Sabadell, Hispanujo, deziras seriozan interŝanĝadon de ne-uzitaj poŝtmarkoj en kompletaj serioj, precipe novaĵojn, kaj U.T.K. Ĉi anonco validas ĉiam.

Morala alvoko: Lokomotivisto perdis siajn tri gefilojn Paŭlo, Karminjo, Rupert. Se ili vivas, ili aĝas nun 32, 30, 28 jarojn. Evakuitaj el lernejo Puig-Florit, Figueras (Gerona) al Ruslando, la lastajn semajnojn de la hispana milito, komence de 1939. Senkonsola patro, Paŭlo Martinez nenion plu eksciis pri ili. Pro tio li petas samideanan monhelpon. Pablo Martinez Marín, Máquina Electricas, Estación Término, Barcelona, Hispanujo.

Hispana fraŭlino korespondos kaj interŝanĝos bildkartojn kaj poŝtmarkojn kun japanaj kaj israelaj fraŭlinoj. F-ino Coral Vilaseca, Str. Mariano Cubí, 126, Barcelona-6, Hispanujo. Mi ŝatus ricevi el la tuta mondo

alumeto-etiketojn; mi sendos laŭ deziro. Ankaŭ el varmaj landoj kaktosemojn diversajn. Adreso: Antonio Khirer 1. Almos-u 2. Nagykörös, Hungarujo.

Vladimir Kozlov, Kubanskaja 3, Jalta (Krimeo), Sovetunio, deziras korespondi kaj interŝanĝi kun junularo de tuta mondo pri filatelo, filmoj, libertempo de junularo en diversaj landoj.

10 Svedaj gekursanoj, 15—20-jaraj deziras korespondi tutmonde. Skribu al S-ro Jan Malmsjö, Ringvägen 27, Skärblacka, Svedujo.

66-jara fervoja oficisto, vitala, espisto, deziras korespondi. Intereso: Ĉiuj landoj kaj homoj, lingvoj, vojaĝoj, bildkartoj k.a. Gösta Erbon, Götgatan 92 A 4v., Stockholm Sö, Svedujo.

40-jara Finnino deziras interŝanĝi bildkartojn kaj bildlibrojn kun la tuta mondo. S-no Marta Björk, Box 11, Danderyd 1, Svedujo.

De Zamenhof-monumentoj, (kaj dokumentoj) Esperanto-grupoj en Afriko/Azio serĉas fotojn/diapozitivojn (interŝanĝe): Anderegg-Gurtner, Horn/Bodensee, Thg., Svislando.

Mi estas 19-jara, ĵus farinta la studentan ekzamenon. Dezirus utiligi la someron ĉe franca familio, plej prefere en Parizo, por pliriĉigi mian scion de franca lingvo. Rekompence mi helpas en la mastrumado. Pri ceteraj detaloj ni interkonsentu letere. Lisette Bergqvist, Sköldgatan 4, Malmö C, Svedujo.

Unua kaj unika libro pri fiŝoj en Esperantujo

Sekretoj de la Marestaĵoj

de Petar Giunio
reverkita de Lic. Marinko Givoje
eldonita sub aŭspicioj de UEA

"Scienca laŭ enhavo ĝi estas beletra laŭ vestaĵo"
— diras pri ĝi E. Balech en la enkonduko.

Prezo: 5.— gld., 20 steloj.

El ĉiuj landoj kiuj povas pagi al Okcident-Eŭropo mendu pogrando kaj podetale ĉe U.E.A., Eendrachtsweg 7, Rotterdam, Nederlando.

El popol-demokratiaj landoj mendu same ĉe S-ro Marinko Givoje, Gornji Trg 31/II, Ljubljana, Jugoslavio.

HALTU en Londono

Oficiala Antaŭkongreso — Seminario "Oriento-Okcidento"

Prospektoj: S-ro V. Sadler 1, Poet's Rd., Highbury, London N. 5.

Norvega Feria Semajno

Orienta Distrikto de Norvega Esperantista Ligo aranĝos Ferian Semajnon en Leangkollen apud Oslo de la 6a ĝis la 12a de aŭgusto 1961. Pri detala informilo/invitilo skribu al O.D. de N.E.L., Sinsenveien 78, REFSTAD, Oslo, Norvegujo.

Notu! Nur 40 lokoj disponeblaj!

Helsingör

invitas vin al siaj internaciaj feriaj Esp-kursoj (perfektiga, konversacia kaj prepara kurso por Cseh-metodaj instruantoj) 23. - 30. de julio 1961. Petu senpagan programon ĉe

L. Friis,
Ingemannsvej 9,
Aabyhøj, Danlando.

La multe atendata faka revuo esperantista

La kolektanto Internacia

ekkomencos aperadi la 1-an de julio 1961 en bela multkolora, riĉe ilustrita formo je utilo kaj bezono de filatelistoj kaj aliaj diversspecaj kolektantoj.

Jarabono : 2,5 us. dol. aŭ egalvaloro en alia valuto. Pagoj en pm. akceptataj nur en kompletaj neuzitaj memorigaj (motivaj) serioj.

Anoncetoj : pri korespondado kaj interŝanĝo 0,75 us. dol. aŭ egalvaloro por minimumo ĝis 25 vortoj aŭ mallongigoj. Por ĉiu plia vorto aŭ mallongigo ankoraŭ 3 cendoj.

Reklamoj-ofertoj je paĝo 32 us. dol.
Senpaga prospekto liverbla !

Adreso : La kolektanto internacia
LJUBLJANA, poŝtkesto 239 "Esperanto"
Jugoslavio.

FERMENTARIO

GRAVA VERKO DE UNIVERSALA VALORO
unu el la ĉefaj de la urugvaja pensulo
D-ro CARLOS VAZ FERREIRA

El la hispana lingvo tradukita de Prof. Manuel Fernández Menéndez kaj revizita de Akademiano D-ro L. C. Porto Carreiro Neto kaj Prof. Ismael Braga.

Aldone biografio kaj portreto de la aŭtoro kaj antaŭparolo kaj glosareto de la tradukinto.
Volumo : formato 21 × 15; 264 paĝoj; bona papero; bone bindita per kartoneto kun bela kovrildesegno.

Jen pluraj temoj el la ENHAVO :
Pri "karaktero" — Principoj — Falsaj antitezoj en la moralo — Moralaj krizoj — Moraligistoj — Pri morala konscienco. — Moralaj juĝoj — Pri la Historio — Racio kaj sperto. — Opozicioj esencaj kaj neesencaj — Pri demokratio — Pri psikologio de la genieco — Pri Frenezo — Pri aĝoj — La mondo de la arto kaj la mondo de la scienco — Por serĉi la veron — Pri sistemoj — La religioj kaj la homoj — Antaŭveni al la problemoj — Scienco kaj metafiziko — Pri la instinkto de senmorteco — Aktuala paralogismo — Psikogramoj (kolekto da originalaj pensoj la plej diversaj) — Reagoj (juĝoj de la aŭtoro pri Spinoza, Comte, Taine, Renan, V. Hugo, Goethe, Verlaine, Rousseau, Stuart Mill, La Bruyere, Dickens, P. Bourget, Balzac, Zola, Ibsen, Unamuno, Hellen Keller, Tolstoj, Bach, Mozart, Beethoven, Wagner, Schubert, ktp.) — Pseŭdo-humoro (kolekto da sagacaj kvazaŭhumoraj komentarioj) — Kia estas la morala signo de la homa maltrankvilo? (gravega).

Prezo US \$ 2,00 (du dolaroj) aŭ frankite
La libron liveras UEA, la diversaj libroservoj kaj la eldoninto

URUGVAJA ESPERANTO-SOCIETO
Calle Yaguarón 1397 - MONTEVIDEO (URUGVAJO)

Konsiderinde reduktitaj prezoj por la Libroj

Biografio Tito	1.80 US dol.
Esperanto kaj lernejo	1.25 „ „
Tri Satiroj	0.25 „ „
Kvar Prelegoj pri E. Literaturo (D. Kralj)	0.90 „ „
Panjo (trad. J. Korinek) J. Seifert	1.00 „ „
Kavo (trad. Vanĉik) G. Kovaĉič	1.00 „ „

Porinfana literaturo (koloro ilustr. rakontoj)

Stelita Lampo, bind.	0.60 „ „
Mojca Etulino, broŝ.	0.25 „ „
Varma Rivereto, bind.	0.50 „ „
Varma Rivereto, broŝ.	0.25 „ „

ktp. ktp.

Kompleta prospekto senpage
Libroj mendeblaj ankaŭ ĉe UEA
Rotterdam

Slovenia Esperanto - Ligo
Eldona Sekcio, Ljubljana poŝtfako 239

La Suda Stelo - Prometeo

Internacia Revuo pri sociaj, kulturaj literaturaj
Jarkolektoj riceveblaj :

Bibliografio, Verda Paletro, Portretoj ktp.
Jarkolektoj riceveblaj :

1959 kaj 1960 po 1 US dol. aŭ egalvaloro
duontole binditaj kun

ora surpriso 1.5 US dol. aŭ egalvaloro
Jarabono por 1961 1.5 US dol. aŭ egalvaloro

Aperos kvaronjare (4 n-roj). Prospekto senpage
liverbla. Perantoj en ĉiuj landoj.

LA SUDA STELO - PROMETEO
Ljubljana, poŝtfako 239

STAFETO

Ed. J. Régulo

1961-1962: PROZO-JARO!

STAFETO progresas laŭ la evoluskemo de la gentaj lingvoj : unue ĉefe poezio, poste pli intense teatro, kaj nun prozo. Sekve dum 1961-1962 STAFETO, sen neglekto de la alia literaturo, ĉefe emfazos la prozan branĉon jene :

- **STELLAN ENGHOLM : HOMOJ SUR LA TERO**
2a eldono finreviziita de la aŭtoro antaŭ lia morto, kun enkonduka eseo de Ferenc Szilágyi pri la vivo kaj signifo de S. Engholm. ĉ. 250-paĝa volumo.
- **RAYMOND SCHWARTZ : KIEL AKVO DE L'RIVERO**
Originala romano; grava, pli ol 400-paĝa volumo.
- **ORIGINALA NOVELARO**
Redakto de Reto Rossetti kaj Ferenc Szilágyi, kun enkonduka eseo de Ivo Rotkvić pri la esperanta novelistiko. ĉ. 350-paĝa volumo.
- **LA ASPEKTOJ DE ESPERANTO**
Laŭ la Fundamento kaj la Zamenhofa Lingvouzo
(Simpozio pri -ata/-ita)
ĉ. 250-paĝa volumo kun kontribuaĵoj de elstaraj esperantologoj zamenhofanoj
(De Hoog, La Colla, Kalocsay, Lapenna, Mikami, Pumpr, Waringhien ktp.)
- **MARJORIE BOULTON : ZAMENHOF**
Ĝisdatigita biografio de la iniciatinto de la Lingvo Internacia, originale verkita en Esperanto, bele ilustrita, ĉ. 250-paĝa volumo.
- **W. E. COLLINSON : CIVILIZO KAJ LINGVO**
Originala traktaĵo pri la interefikoj de civilizo kaj lingvo, surbaze de Esperanto.
ĉ. 300-paĝa volumo.
Poste sekvos volumoj de Francis, Neergaard, Régulo, Ribillard, Rotkvić ktp.

Kunhelpu pluporti la torĉon!

Ĉiujn titolojn liveras la libroservo de U.E.A.!